

# KRESKO 7

2018 junio

KROATA ESPERANTISTA KOLEGARO

## Jubilea Alp-Adria Konferenco

Inter la 8-a kaj 10-a de junio en Bjelovar (Kroatio, 90 kilometrojn for de Zagrebo) okazis la jubileo 20-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco, kiun partoprenis okdeko da esperantistoj el Aŭstrio, Bosnio kaj Hercegovino, Hungario, Italio, Kroatio kaj Slovenio. Ili diskutis pri du konferencaj temoj: *Alp-Adrio kaj Danubio* kaj *Publikaj rilatoj de esperantistoj kun neesperantistaj medioj*.



Temo: Alp-Adrio kaj Danubio  
Bjelovar, 8-10 de junio 2018



Tema: Alpe-Jadran i Podunavlje  
Bjelovar, 8.-10. lipnja 2018.

Organizanto: Bjelovara esperantista societo  
Organizator: Društvo esperantista Bjelovara





## Interkona vespero

Vendrede, la 8-an de junio, en la Dolĉaĵejo Zagorje, kiu iam servis kiel kunvenejo de bjelovaraj esperantistoj, okazis Interkona vespero de alp-adriaj esperantistoj, kiuj aliĝis al sia 20-a



konferenco. Partoprenis dudeko da eksterlandnoj kaj bjelovaranoj, kiuj pasigis kelkajn horojn en agrabla kunestado kaj interparolado.

## Ĝi kresku, floru kaj prosperu



Okaze de la 20-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco, Bjelovar ricevis sian unuan ZEO-n. Malgraŭ la enurba tradicio de Esperanto ekde 1909, en Bjelovar ĝis nun ekzistis neniu signo pri Esperanto en publika loko. La 9-an de junio ĉi jare, je la iniciato de Bjelovara esperantista societo, la partoprenantoj de la 20-a konferenco plantis la **Arbon de internacia amikeco**, kies plantadon permesis kaj ĉiujn kostojn pagis la Urbo Bjelovar. Antaŭ la plantado enkonduke parolis **Josip Pleadin** (foto 1), membro de la organiza komitato de la konferenco, kiu diris, ke la arbo troviĝas en la ĝusta loko, en la parko portanta la nomon de la kroata politikisto kaj esperantisto **Stjepan Radić**, kiu lernis Esperanton estante ministro de edukado en la tiama registaro. Pluraj ĉeestintoj eluzis la okazon por ŝuti iom da tero ĉirkaŭ la arbo kaj por akvumi ĝin. Inter tiuj la plej fervoraj estis **Franjo Forjan**, prezidanto de la loka societo kaj **Edvige Ackermann** (foto 2), sekretario de la Esperanto-Rondo de Alp-Adrio, kiu al la Arbo ekdeziris, ke ĝi longe vivu kaj kresku kiel la grandaj tilioj en ĝia apudo. Sekvis grupa fotado ĉe la arbo (foto 3), kiu estas signita per speciala tabulo kun dulingva teksto (foto 4).





# Altrangaj gastoj en la malfermo



La malferma solenaĵo okazis en la Urba muzeo sabate, la 9-an de junio, je la 11h00 kun partopreno de la departementestro, sinjoro **Damir Baj**s, la estrino de la departementa Fakoj pri edukado, kulturo kaj sporto, sinjorino **Snjezana Mišir** kaj reprezentanto de la Urbo Bjelovar, sinjoro **Ivica Vrhovnik**.

Menciendas, ke la konferenco okazis en kadre de la festado de Tago de la Departamento Bjelovar-Bilogora, kiu estis ĝia oficiala aŭspicianto, do des pli agrablas la fakto, ke la malfermon per sia ĉeesto honorigis la altrangaj gastoj.

Dum la malferma ceremonio la ĉeestantojn alparolis la urba reprezentanto **Ivica Vrhovnik**, la departementestro **Baj**s kaj la sekretariino de la Esperanto-Rondo de Alp-Adrio **Edvige Ackermann** el Triesto, kaj **Franjo Forjan** legis salutleteron de **Radimir**



**Fotoj (supra vico de maldekstre):** 1) *Salutas Ivica Vrhovnik nome de la ubestro,* 2) *S-ino Snjezana Mišir kaj la departementestro Baj*s inter la konferencanoj, 3) *Salutparolas s-ro Damir Baj*s, 4) *Franjo Forjan legas la salutleteron de Radimir Čačić, (malsupra vico, de maldekstre):* 1. *Mária Eszes kaj Boris Di Costanzo kun la Interkonsento de la du organizaĵoj (HEA kaj KEL),* 2. *Marija Belošević salutis nome de KEU,* 3) *Edvige Ackermann gvidis la malfermon.*

**Čačić**, la estro de la Varaždina departemento, kiu estas la aktuala prezidanto de Alp-Adria Alianco.

Sekvis salutoj de la du kroataj Esperanto-organizaĵoj: nome de Kroata Esperanto-Ligo (KEL) salutis **Boris Di Costanzo**, kaj nome de Kroata Esperantista Unuiĝo (KEU)

**Marija Belošević**. Salutis ankaŭ reprezentantoj de Hungaria Esperanto-Asocio (Mária Eszes), Itala Esperanto-Federacio (Elda Doerfler), Slovena Esperanto-Ligo (Janez Jug), Aŭstria Esperanto-Federacio (Anton Oberndorfer) kaj aro da societoj, grupoj kaj movadaj institucioj.

## El la salutletero de Radimir Čačić:

Mi ĝojas, ke per sia agado Bjelovara esperantista societo daŭrigas la longan tradicion, flegante kaj promociante la universalan lingvon Esperanto, kiu en Bjelovar ekzistas ekde la komenco de la 20-a jarcento, kaj eĉ pli mi ĝojas, ke vi organizas internaciajn aranĝojn kia estas la hodiaŭa. Ĝuste tio estas la celo ankaŭ de la agado de Alp-Adria Alianco, kiu al siaj membroj klopodas faciligi reciprokajn interligiĝon kaj komunikadon, kiuj povas rezulti per novaj projektoj kaj komunaj aktivecoj.

Mi deziras al vi ĉiuj multajn sukcesojn dum la hodiaŭa konferenco kaj plurajn bonajn projektojn de kunlaboro en la estonteco!

Kun estimo,

Prezidanto de Alp-Adria Alianco

Estro de la Varaždina departemento Radimir Čačić




## Du laborsesioj kaj du temoj

La labora parto de la konferenco okazis en du sesioj kaj estis dediĉita al la temoj *Alp-Adrio kaj Danubio kaj Publikaj rilatoj de esperantistoj kun neesperantistaj medioj*. En la unua sesio estis prezentitaj tri prelegoj: *Alp-Adrio kaj Danubio – eŭropaj regionoj* (Edvige Ackermann), *Iniciato por komuna agado de esperantistoj en la regiono Alpoj-Danubo-Adrio* (Anton Miheliĉ) kaj *Pasintaj atingoj, nunaj cirkonstancoj kaj estontaj eblecoj* (legita de Janez Jug nome de la aŭtoro Janez Zadavec, kiu ne povis partopreni).

En la dua sesio prelegis Josip Pleadin pri *Rilatoj kun neesperantistaj medioj – bjelovaraj spertoj*, Anton Oberndorfer pri *Esperanta retradio* kaj Mária Eszes pri *La kontakto de la religioj kaj la arto*.

La muzikan paŭzon inter la prelegoj plenumis lernantino de la kvara klaso de la bjelovara Muziklernejo *Vatroslav Lisinski* Marta Ĉuković, kiun por ĉi tiu okazo trejnis profesoro Siniša Pauška.



Prelegantoj de la unua sesio: Edvige Ackermann, Janez Jug kaj Anton Miheliĉ, kaj la juna bjelovara gitaristino Marta Ĉuković.

## Asembleo de alp-adrianoj

Sabate okazis ankaŭ tre vigla asembleo de alp-adriaj esperantistoj, dum kiu oni diskutis pri la pluaj direktoj de ilia laboro kaj diskonigis konkurson por gastiganto de la 21-a konferenco. Estis akceptita rezolucio, sendota al reprezenantoj de Alp-Adria Alianco en la ŝtatoj-membroj.



### REZOLUCIO

#### de la 20-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco

Ni, partoprenantoj de la jubilea 20-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco, kunvenintaj inter la 8-a kaj 10-a de junio 2018 en Bjelovar (Kroatio),

- festante la 40-an datrevenon post la fonda de Alp-Adria Laborkomunumo,
- subtenante kaj prezante la celojn de la Alp-Adria Alianco kiel ĝia posteulo
- kaj diskutante pri la temo *Alp-Adrio kaj Danubio*:

1. Invitas la esperantistojn de la regionoj de Alp-Adrio kaj Danubio profundigi kaj ampleksigi la transliman kunlaboron de siaj organizaĵoj kaj unuopuloj en la kultura, eduka, sporta kaj ĉiu alia senco, por bonfarto de la popoloj vivantaj en la respektivaj regionoj.

2. Invitas la esperantistojn de la regionoj de Alp-Adrio kaj Danubio disvastigi Esperanton kaj uzi ĝin cele al translima kaj regiona kunlaboro, establi rilatojn inter siaj naciaj Esperanto-ligoj, fortigi siajn organizaĵojn en personara, materia kaj eduka sencoj, por povi alfronti la defiojn de ni epoko.

3. Invitas la Alp-Adria Aliancon kaj ĝiajn reprezentantojn kaj funkciulojn de lokaj kaj regionaj aŭtoritatoj turni sian atenton al la riĉa aktiveco de esperantistoj en tiu regiono dum la pasintaj 29 jaroj kaj certigi al ilia laboro la necesan materian kaj moralan subtenon.

En Bjelovar, la 9-an de junio 2018





## Kultura programo

La kultura programo de la konferenco okazis post la komuna tagmanĝo (*foto maldekstre*) en la Hotelo *Central*. La kulturalan programon gvidis **Ljerka Stilinović**, kaj ĝi konsistis el du muzikaj koncertoj. Komence prezentiĝis **Neven Mrzlečki** el Zagrebo per 40-minuta Esperanta repertuaro (*foto maldekstre meze*) kaj poste la virina koruso *Főnix* el Komló (Hungario) per konataj Esperantaj kantoj (*foto malsupre*). La hungaran koruson estras s-ino **Mária Csonka**, kaj ilia programo realiĝis dank' al la prezidantino de Hungaria Esperanto-Asocio **Mária Eszes** enkadre de la kunlaboro de la landaj asocio hungara kaj kroata, kiuj ĝuste en Bjelovar en 2011 subskribis Interkonsenton pri kunlaboro.

Estis planita ankaŭ recitado de poezio el la alpa kaj adria regionoj, sed pro tempomanko ĝi estis nuligita kaj proponita por iu alia okazo.

Post la kultura programo, por amuzo kaj danco ludis kaj kantis la konata bjelovara muzikisto **Marijan Žiher**.



## Dolĉaĵon ĉe la fino!

Por la 20-a „naskiĝdato” de la Alp-Adriaj konferencoj, **Edvige Ackermann** kiel sekretario de la Alp-Adria Esperanto-Rondo kaj **Franjo Forjan** kiel gvidanto de la organiza teamo de la aranĝo, tranĉis specialan torton (*foto maldekstre*) bakitan kaj donacitan de la Dolĉaĵejo *Zagorje*. Dolĉaĵon ĉe la fino! Bonan apetiton!

## Ekskurso al Daruvar

Kvankam la 10-an de junio en Bjelovar restis malmultaj konferencanoj, la planita ekskurso al Daruvar okazis laŭplane. La grupon en Daruvar gvidis sperta ĉiĉeronino, prof. **Ana Vodvarka**, kiu al la ekskursantoj montris la kastelon de la nobela familio Janković, la parkan kaj termalan partojn de la urbo kaj la urbocentron, koniginte al ili la historion de la urbo ekde la romia tempo ĝis nun. Samtempe kun nia vizito, en la urbo okazis turisma aranĝo *Vinodar*, ĉefe dediĉita al vino kaj vinproduktado, sed kelkaj ekskursantoj eluzis la lokan foiron por aĉetadi la regionajn naturajn produktojn, amuziĝi en la amuzejo aŭ naĝi en la termalaj basenoj.



Pliaj fotoj ĉe: [http://www.esperanto-bjelovar.hr/aa\\_e.html](http://www.esperanto-bjelovar.hr/aa_e.html)

## Pri kelkaj popularaj nezamenhofaĵoj en la nuntempa Esperanto

Kiel ĉiu vivanta lingvo, Esperanto konstante evoluas. Zamenhof asertis, ke ĝi “devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiuj estis ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj”. La evoluo de Esperanto efektiviĝas i.a. per: (1) konstanta plimultiĝo de la radikaro (ekz. oni nur antaŭnelonge enkondukis la vortojn: *akĉento*, t.e. nekutima prononcmankado, *grafitio*, t.e. anonima murskribaĵo, *fano*, t.e. fervora admiranto), (2) plilarĝigo de la signifo de iuj radikoj kaj de jam ekzistantaj derivaĵoj (ekz. *disko* – iam signifis nur platan, rondan objekton uzatan en ĵetludoj, nun ĝi signifas ankaŭ platan, rondan objekton, sur kiu estas registritaj iaj datumoj; *paĝo* – iam signifis nur iun el la du flankoj de paperfolio, nun ĝi signifas ankaŭ parton de retejo en interreto; *ligilo* – iam signifis nur ĉion, kio servas por ligi, ekz. leda ligilo, nun ĝi signifas ankaŭ elementon de elektronika dokumento resendanta al alia dokumento aŭ al alia parto de la sama dokumento), (3) senĉesa estiĝo de novaj kunmetaĵoj kaj derivaĵoj ligitaj kun la disvolviĝo de la civilizacio (ekz. *feltkraĵono*, t.e. kraĵono, kiu ellasas inkon tra pinto el felto aŭ simila pora substanco, *retejo*, t.e. eninterreta teksto trovebla sub unu adreso, *poŝmemorilo*, t.e. eta flankaparato enhavanta memoron de komputilo), (4) utiligo de diversaj ebloj entenataj en la strukturo de la lingvo por krei novajn lingvaj formojn (ekz. *fare de*, *havintus*, *etmono*), (5) enkonduko de gramatikaj ennovaĵoj motivataj de praktikaj kialoj (ekz. sufikso *-i-* anstataŭ *-uj-* en landnomoj, do anstataŭ *Francujo*, *Rusujo*, *Ĉinujo* oni nun ofte diras *Francio*, *Rusio*, *Ĉinio*; finaĵo *-a* anstataŭ *-o* en eŭropaj virinaj nomoj, do anstataŭ *Johanino*, *Mariino*,

*Juliino* oni nun ofte diras *Johana*, *Maria*, *Julia*), (6) anstataŭigo de kelkaj konfuzaj formoj per formoj nedubasencaj (ekz. la Zamenhofa konstruo *oni ne devas fari tion* estas nun ofte anstataŭigata per *oni devas ne fari tion*).

Tiu ĉi lasta ekzemplo montras, ke la Esperanto-parolantoj ne hezitas forlasi formojn devenantajn de Zamenhof, se ties uzado naskas tia- aŭ alispecajn problemojn.

Tamen, paralele al tiuj laŭdindaj tendencoj, ni povas observi negativajn devoviĝojn for de la Zamenhofa lingvouzo, kiuj fontas el simpla nekompreneo kaj senbezone komplikas la nuntempan Esperanton aŭ senigas ĝin je signifonuancoj. Mi deziras preparoli kelkajn tiajn devoviĝojn.

La unua el ili troveblas sur la komencaj paĝoj de multaj Esperanto-lernolibroj kaj povas efike fortimigi plurajn lernantojn. Temas pri frazoj prezentantaj novajn, nekonatajn al la alparolato objektojn (personojn kaj aĵojn) singulare kaj plurale. En la etnaj lingvoj tiuj frazoj apartenas al la fundamenta repertuaro de ĉiuj denaskaj lingvouzantoj kaj estas simplaj kaj facile memoreblaj: en la angla *This is...*, *These are...*, en la franca *C'est...*, *Ce sont...*, en la germana *Das ist...*, *Das sind...*, en la rusa *Это...*, en la pola *To jest...*, *To są...* ktp. La demando estas: kiel diri tion en Esperanto? Multaj kredas, ke uzante la koncernajn personpronomojn, do ekz. *Ĝi estas domo*, *Li estas Roberto*, *Ŝi estas Anna*, *Ili estas libroj*, *Ili estas infanoj*. Aliaj opinias, ke oni devas utiligi du montrajn pronomojn: *tio* por aĵoj kaj *tiu* aŭ *tiuj* por personoj, do *Tio estas domo*, *Tiu estas Roberto*, *Tiu estas Anna*, *Tio estas libroj*, *Tiuj estas infanoj*. Kiun ajn el tiuj du sistemoj la aŭtoro de lernolibro aplikas, la lernanto

estas frapita de ĝia komplikeco, precipe se li komparas ĝin kun ĝia ekvivalento en la gepatra lingvo.

Dume en tiaj okazoj Zamenhof kaj aliaj klasikuloj de Esperanto uzis nur unu esprimon: *Tio estas...* (en la preterito: *Tio estis...*). Jen iom da ekzemploj el la verkaro de Zamenhof kaj Kabe: *Tio estas oro<sup>Z</sup>*, *Tio estas mensogo<sup>Z</sup>*, *Tio estas Nilo<sup>B</sup>*, *Tio estas sensencaĵo<sup>B</sup>*, *Tio estas bela floro<sup>Z</sup>*, *Tio estas vera plezuro<sup>Z</sup>*, *Tio estas belega preĝejo<sup>Z</sup>*, *Tio estas stranga ideo<sup>Z</sup>*, *Tio estas malnobla ago<sup>B</sup>*, *Tio estas scienca libro<sup>B</sup>*, *Tio estas fulmotondraj nuboj<sup>Z</sup>*, *Tio estas tri beletaj vergoj<sup>Z</sup>*, *Tio estas alilandaj manieroj<sup>Z</sup>*, *Tio estas veraj perloj<sup>B</sup>*, *Tio estas maraj brutoj<sup>Z</sup>*, *Tio estas malfacilaj demandoj<sup>B</sup>*, *Tio estas granda sinjoro<sup>B</sup>*, *Tio estas via onklo<sup>B</sup>*, *Tio estas Bazarov, mia amiko<sup>B</sup>*, *Tio estas Paŭlo Petroviĉ<sup>B</sup>*, *Tio estas Salomono de Caus<sup>Z</sup>*, *Tio estas la episkopo de Zelando<sup>Z</sup>*, *Tio estas Samuelo, filo de Esdreas<sup>B</sup>*, *Tio estas mia kuzino<sup>Z</sup>*, *Tio estas ja Marta Ŝwicka<sup>Z</sup>*, *Tio estas knabino kun kapabloj<sup>Z</sup>*, *Tio estas lia edzino<sup>Z</sup>*, *Tio estas mia dancantino<sup>B</sup>*, *Tio estas mia parencino kaj servistino, Ester<sup>B</sup>*, *Tio estas Fenicianoj<sup>B</sup>*, *Tio estas la kortegjunuloj<sup>Z</sup>*, *Tio estas la filoj de Jakob<sup>Z</sup>*, *Tio estas tiuj, al kiuj la Eternulo ordonis...<sup>Z</sup>*, *Tio estas la naskitoj de Manase<sup>Z</sup>*, *Tio estas viaj tre fidelaj servistoj<sup>B</sup>*, *Tio estas la infanoj de viaj servistoj<sup>B</sup>*, *Tio estis magazeno de juvelisto<sup>Z</sup>*, *Tio estis Adamo Rudziński<sup>Z</sup>*, *Tio estis viro, havanta la aĝon de ĉirkaŭ dudek tri jaroj<sup>Z</sup>*, *Tio estis juna virino<sup>B</sup>*, *Tio estis egipta kamparano<sup>B</sup>*, *Tio estis portistoj<sup>Z</sup>*, *Tio estis fiŝistoj<sup>B</sup>*, *Kio tio estis?<sup>Z</sup>*, *Kiu estas tio?<sup>B</sup>*

Krome Zamenhof foje uzis *Tio ĉi estas* aŭ *Ĉi tio estas...*, ekz. *Tio ĉi estas tute alia afero*, *Tio ĉi estas ja bonegaj vestoj*, *Tio ĉi estas mia edzo*, *Ĉi tio estas la signo de la*



*interligo, Ĉi tio estas vantaĵo.*

Kiel ni vidas, ĉe Zamenhof kaj Kabe la pronomo *tio* servas kiel ĝenerala indika pronomo, uzebla kaj por aĵoj, kaj por personoj, kaj singulare, kaj plurale.

Ĉi tiu facila kaj klara maniero prezenti novajn objektojn devus esti aplikata de ĉiuj lernolibro-aŭtoroj kaj instruistoj en la unua periodo de instruado. Nur poste oni eventuale povas enkonduki la nezamenhofan manieron *tio* por aĵoj, kaj *tiu/tiuj* por personoj. Sed se temas pri la uzado de la triapersonaj personpronomoj — *li, ŝi, ĝi* kaj *ili* — por prezenti nekonatajn personojn kaj aĵojn, oni devas substreki, ke ĝi neniel estas pravigebla. Tiuj ĉi pronomoj havas tute alian signifon kaj plenumas tute alian funkcion. Ili estas uzeblaj nur tiam, kiam la persono aŭ aĵo jam estis indikita (ekz. per gesto), aŭ kiam pli frue en la teksto ĝi estis menciita. En la etnaj lingvoj ekzistas diferenco inter *Tio estas instruisto* kaj *Li estas instruisto*. Per la unua frazo oni prezentas nekonatan viran personon, per la dua oni informas, kio la jam prezentita vira persono estas. Tial ne *Li estas Petro. Li estas mia amiko*, sed *Tio estas Petro. Li estas mia amiko*, ne *Ŝi estas Maria. Ŝi loĝas ĉi tie*, sed *Tio estas Maria. Ŝi loĝas ĉi tie*, ne *Ĝi estas nia domo. Ĝi havas dek etaĝojn*, sed *Tio estas nia domo. Ĝi havas dek etaĝojn*, ne *Ili estas miaj genajbaroj. Ili estas tre helpemaj*, sed *Tio estas miaj genajbaroj. Ili estas tre helpemaj*, ne *Ili estas kampfloroj. Ili tre bonodoras*, sed *Tio estas kampfloroj. Ili tre bonodoras*. Tian distingon Zamenhof ĉiam zorgis konservi, sed hodiaŭ ĝi estas konsciata de nur parto da Esperanto-uzantoj.

La analizon de la dua nezamenhofaĵo mi komencu per citaĵo el *La tuta Esperanto* de Henrik Seppik. En la ĉapitro “Kio, kiu, kia” li skribis:

“Kun substantivoj estas uzeblaj la ‘ia’-vortoj (*ia, kia, tia, ĉia, nenia*) kaj ‘iu’-vortoj (*iu, kiu, tiu, ĉiu, neniu*): *Kian libron vi*

*legas? Mi legas interesan (dikan, novan, Esperantan) libron. Kiun libron vi legas? Mi legas ‘Sub la jugo’.* Kiel la respondoj montras, *kia libro* kaj *kiu libro* ne estas egalaj: demandante per KIA, oni volas ekscii la ecojn (kvalitojn), demandante per KIU, oni volas ekscii la nomon.”

Kaj jen citaĵo pri la sama temo el *Plena analiza gramatiko de Esperanto* de Kálmán Kalocsay kaj Gaston Waringhien:

“Kiu demandas pri iu elektita el difinita nombro (demanda adjektivo elekta): *kiu lernanto tion faris* (kiu el la lernantoj)? kiun *tagon ni havas hodiaŭ* (el la semajn-tagoj)?

“Kia demandas:

“1. Pri kvalito: *kia vetero estas hodiaŭ? kian uniformon li portas?* (respondo: *husaran*; sed: *kiun uniformon, la novan aŭ la malnovan* = kiun el la du?).

“2. Pri objekto ne rilatigita, en la spirito de la parolantoj, al difinita kvanto, aŭ pri abstrakta substantivo: *kiaj nekalkuleblaj riĉaĵoj estas en la naturo?*<sup>Z</sup> *kian komprenon vi havas pri la libereco?*<sup>Z</sup> *kia rezultato?*<sup>Z</sup> *kian aĝon vi havas? kia dato estas hodiaŭ? kian libron vi legas?* (respondo: *la Faraonon*; sed: *kiun libron de Dickens vi legas?* = kiun el la libroj de D.).

(...)

“Rim I. Z. uzas jen *kian*, jen *kiun aĝon*. La ĝusta, laŭ la analogio de la supraj ekzemploj, ŝajnas *kian aĝon*, ĉar oni ne povas diri: *kiun el la aĝoj*, do ne temas pri determino elekta.”

Al la plimulto da Esperanto-uzantoj tiel ekplaĉis la konciza kaj facile komprenebla regulo formulita de Seppik en *La tuta Esperanto*, ke ili eĉ ne rimarkis, ke ĝi ne estis bazita sur lingvaj faktoj. Kontraŭe al la aŭtoroj de PAG, Seppik ne apogis sian komprenon pri la signifo de la pronomoj *kia* kaj *kiu* per ekzemploj el Zamenhof. Cetere li ne povus tion fari, ĉar tiaj ekzemploj ne ekzistas. Al Zamenhof, Kabe kaj aliaj klasikuloj la distingo farita

en *La tuta Esperanto* estis tute fremda. Ĉe ili — kiel prave skribis Kalocsay kaj Waringhien — *kiu* demandas pri objekto apartenanta al difinita, limigita aro da objektoj, el kiu la respondanto devas elekti, dum *kia* demandas aŭ pri objekto ne apartenanta al tia aro da objektoj, aŭ pri eco. Sed tio ne detenis la novan regulon disvastiĝi nek malhelpis instruistojn kaj eĉ aŭtorojn de lernolibroj ilustri ĝin per novaj, fantaziaj ekzemploj en la speco de: *En kiu urbo vi loĝas? En Stokholmo. En kia urbo vi loĝas? En granda kaj bela. Kiu estas via adreso? 60 Jackson Road, London N 6. Kia estas via adreso? Longa kaj malfacile memorebla.* Tamen ĉi tiuj grandefektaj sinsekvoj de *kiu/kia*-demandoj kaj respondoj al ili havas nenion komunan kun la lingva deponaĵo enhavata en la klasikaj Esperanto-literaturaĵoj, interrompas la lingvan tradicion kaj, kontraŭ ĉia ŝajno, ne ordigas, sed ĥaosigas la lingvon.

Jen manpleno da pliaj ekzemploj kun *kia* demandanta ne pri kvalito, sed pri objekto ne apartenanta al difinita kvanto: *Kia estas via nomo?* (respondo: *Jakob*)<sup>Z</sup>, *Kia estas lia nomo?* (respondo: *Arkadio Nikolaiĉ Kirsanov*)<sup>B</sup>, *Kia estas la nomo de via filo?* (respondo: *Izaako*)<sup>B</sup>, *Kia estas via opinio pri la kronprinco?*<sup>B</sup>, *Kia estas via opinio, ĉu ne vere?* (respondo: *tute vere*)<sup>Z</sup>, *Kia estas la aspekto de la viro...?* (respondo: *Li estas homo kovrita de haroj, kaj ledan zonon li havas ĉirkaŭ siaj lumboj*)<sup>Z</sup>, *Kia estas lia aspekto?* (respondo: *Li havas flavruĝajn harojn kaj barbon*)<sup>B</sup>, *Kia estas la titolo de la libro?* (respondo: “*Pelouse et Frémy: Notions générales*”)<sup>B</sup>, *Kia estas la celo, al kiu vi iras?*<sup>B</sup>, *Kia estas la sekvoj, kiujn ni atendas de ĝi?*<sup>Z</sup>, *Ĉu vi ne donos ian ordonon? Kian ordonon?*<sup>Z</sup>, *Kian rolon ludis en la nuna stato de lia animo Hiram kaj Kama?*<sup>B</sup>, *Kiajn rajtojn vi havas?*<sup>Z</sup>, *Kiajn ŝanĝojn en la ŝtato ili povas postuli?*<sup>B</sup>, *Kian signifon havas la morto?*<sup>Z</sup>, *Kia estas la kaŭzo?*<sup>B</sup>, *Kian procenton*

vi postulas? (respondo: kvin talentojn jare)<sup>B</sup>, Kian prokulpan oferon mi repagu al li?<sup>Z</sup>, Kian profiton havas la homo de ĉiuj siaj laboroj...?<sup>Z</sup>, Kiajn pruvojn vi havas?<sup>B</sup>, Kian maljustaĵon viaj prapatroj trovis en Mi...?<sup>Z</sup>, Kian aferon li povas havi por mi?<sup>B</sup>, Kian kanton la leontodo povis kanti? Ankaŭ ĝia kanto ne estis pri Kay?<sup>Z</sup>, Kia estas la afero, pri kiu Li parolis al vi?<sup>Z</sup>, Kiajn arbojn [vi plantis]? (respondo: akaciojn)<sup>B</sup>, Mia koro divenas, ke vi, patrino, havas ian planon pri mi. Kian?<sup>B</sup>, Kian epiteton vi donus al mi, se mi neniiĝus la asirian armeon...?<sup>B</sup>, Kian aĝon vi havas? (respondo: la nombro de la jaroj de mia migrado estas cent tridek jaroj...)<sup>Z</sup>, Kian aĝon havas via patro? (respondo: kvardek kvar)<sup>B</sup>, Eble ni aldonu al ĝi ankoraŭ unu ingrediencan... Kian?<sup>Z</sup>

Kaj jen, por komparo, dekelko da demandoj el intervjuoj faritaj de la redaktoro de konata, altkvalita nuntempa Esperanta revuo, alte taksata ankaŭ pro ĝia lingva nivelo: *Kiun rolon havas nun la Akademio de Esperanto?*, *Kiun opinion vi havas pri ĉi tiu revuo?*, *Kiuj estis la reagoj al la svisa enciklopedio?* *Kiuj laŭ vi estas la malfortoj de la libro?*, *Kiujn ĉefajn problemojn vi alfrontis dum la laboro?*, *Kiujn atingojn kaj malatingojn, laŭ via opinio, vi havis kiel prezidanto de UEA?*, *Kiuj pozitivaj kaj negativaj tendencoj aperis post la centjariĝo de Esperanto?*, *Kiujn ĉefajn problemojn frontis LKK?*, *Kiujn impresojn vi havas pri la preparo kaj okazigo de la kongreso?* Tamen de tempo al tempo la demandoj estas formulitaj laŭzamenhofs: *Kiaj estas la konkludoj pri la svisa planlingva movado?*, *Kiajn novajn projektojn vi havas nuntempe?*, *Kiajn opiniojn ili havas?* En unu numero de la revuo la intervjuon faris iu alia (ĉar la intervjuato estis la redaktoro mem), kun la jena ne-kiuisma rezulto: *Kia estis via reago, kiam vi eksciis pri via elekto?*, *Kiaj estas viaj personaj planoj kaj*

*la perspektivoj de via revuo, via eldonejo, por la proksimaj jaroj?*, *Kiajn avantaĝojn kaj riskojn vi vidas en la eldonado de e-libroj en Esperanto?* Du demandoj de la ĉi-lastata intervjuo tekstas: *Kiujn tendencojn en la nuntempa Esperantujo vi opinias plej subtenindaj?* *Kiujn plej negativaj?*, sed tio ĉi estas korekta, ĉar ili postulas elekton el inter la ekzistantaj tendencoj. Same la redaktoro de la revuo en alia numero korekte demandis: *Ekster UEA kaj la Civito estas pluraj aktivadoj realaj kaj virtualaj, gazetaj kaj retaj. Kiuj el ili estas la plej atentindaj?*

Laŭ la supre cititaj demandoj estas videble, ke unue, la postzamenhofs uzo de la pronomo *kiu* kaj *kia* estas malunueca, kaj due, ke ĝi estas malfacila en la praktiko, ĉar ofte eĉ unu sama persono hezitas, kiun el ili elekti.

Pro la estiĝintaj duboj foje okazas, ke iuj — ne sciante, ĉu uzi *kiu* aŭ *kia* — utiligas tute alian pronomon: *kio*, pligrandigante ĉi-maniere la jam ekzistantan ĥaoson. Jen kelkaj ekzemploj: *Kio estas via opinio?*, *Kio estas via sugesto?*, *Kio estas viaj interesoj?* *Kio estas via nomo?* *Kio estas via lando?* *Kio estas via profesio?*

Precipe ofte uzatas *Kio estas via nomo?* Bertilo Wennergren, demandite en la retejo *lernu.net*, ĉu uzi *Kio estas via nomo?* aŭ *Kiu estas via nomo?*, respondis, ke “multegaj diras *Kio estas via nomo?*, kaj tio ne estas erara”, sed al li “estas nature rigardi tian demandon kiel elekton inter ĉiuj diversaj nomoj de la mondo, kaj do uzi *kiu* (*Kiu el ĉiuj nomoj estas via nomo?*)”.

El ĉi tiu respondo sekvas, ke s-ro Wennergren — la aŭtoro de *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* — ne scias kaj ne komprenas tion, kio estas evidenta por ĉiuj lingvistoj kaj gramatikistoj, inkluzive de la aŭtoroj de PAG. Spite al lia konvinko homoj en sia lingva aktivado ne perceptas ĉiujn objektojn de koncerna kategorio, kiuj ekzistas en la mondo, kiel

apartenantajn al difinita kvanto, do kiel elekteblajn. En ilia konscio tiuj objektoj estas rilatigitaj al nenia difinita grupo. Tion pruvas la ĉiutaga lingva praktiko en etnaj lingvoj, kaj tion pruvas la lingvouzo de Zamenhof, kies intuicio ankaŭ ĉi-kaze montriĝas fidinda. Kiel ni vidis supre, li demandis *Kia estas via nomo?* Pro la sama kaŭzo la anglalingvanoj demandas en sia lingvo *What is your name?*, ne *Which is your name?* La pronomo *what* en *What is your name?* servas por demandi pri nekonata objekto, do pri objekto, kiu ne apartenas al difinita aro. La demando povus teksti *Kiu estas via nomo?* kaj *Which is your name?*, se ies nomo ekz. troviĝus sur listo de nomoj, kaj la demandato devus indiki la sian. Pro la sama kaŭzo la germanoj demandas *Wie ist deine Adresse?* (= *Kia estas via adreso?*), por sciigi pri la loĝloko de la alparolato, kaj *Welche ist deine Adresse?* (= *Kiu estas via adreso?*), se tiu devas elekti el inter limigita aro da adresoj. Pro la sama kaŭzo la rusoj demandas *В каком городе ты живёшь?* (= *En kia urbo vi loĝas?*), se ili volas ekkoni la nomon de la urbo, kaj *В каком городе ты живёшь?* (= *En kiu urbo vi loĝas?*), por igi iun elekti el inter grupo da urboj konataj de la interparolantoj. Pro la sama kaŭzo la poloj demandas *Jaki samochód kupiłeś?* (= *Kian aŭtomobilon vi aĉetis?*), se ilin interesas la fabrikmarko de la aĉetita aŭto, kaj *Który samochód kupiłeś?* (= *Kiun aŭtomobilon vi aĉetis?*), se ili deziras sciigi, kiun el la pli frue priparolataj aŭtoj la interparolanto aĉetis. Kaj revenante al la demando *Kio estas via nomo?*, s-ro Wennergren tute prave skribis, ke ĝi ne estas erara, kaj oni eĉ povus ĝin respondi: ekz. per *Mia nomo estas substantivo*.

La tria nezamenhofaĵo naskiĝis en la kapo de Louis de Beaufront, posta kunkreinto de Ido. Li ne komprenis la Zamenhofan uzadon de la vorto *unu* en la funkcio de duondifina adjektivo. En okazoj, kiam la parolanto konas



kaj povus nomi la koncernan objekton, sed ne precizigas ĝin al la alparolato, Zamenhof sisteme uzis unu, ekz.: *Antaŭ multaj jaroj vivis unu reĝo, Tie estis unu riĉa virino, kiu retenis lin, Unu patrino sidis apud sia malgranda infano, Unu malriĉa instruistino longan tempon suferis malsaton, En unu vilaĝo loĝis du viroj, kiuj ambaŭ havis la saman nomon, Sur la korton rigardas la fenestroj de la loĝejo de unu riĉa kaj diotima sinjorino, Unu tagon estis forta pluvo, Unu matenon oni ĝin aĉetis, Unu vesperon fariĝis granda uragano..., Unu fojon la reĝino veturis tra la lando..., Unu vidvino havis du filinojn.* En 1902 Beaufront, reeldonante la *Zamenhofan Ekzercaron de la lingvo internacia Esperanto*, korektis la ĉi-lastan frazon al: *Vidvino havis du filinojn.* Kaj tiu kripligita frazo fariĝis ekzemplo por aliaj, i.a. por la jam citita Henrik Seppik. En *La tuta Esperanto* li skribis:

“Nedifina artikolo en Esperanto ne ekzistas. Jam per si mem la vortoj estas nedifinitaj: *lampo = iu lampo, tablo = iu tablo*, ktp.

“Kelkfoje tamen unu estas uzata kiel nedifina artikolo (*Unu vidvino havis du filinojn* ĉe Zamenhof), sed tio ne estas imitinda, ĉar unu kiel numeralo indikas ja nombron, kaj dirante unu vidvino oni asertas, ke ne temas pri du aŭ pli multaj vidvinoj, sed pri unu sola. La uzado de unu kiel nedifina artikolo povas kaŭzi eĉ miskomprenojn: se vi diras *mi havas unu bonan edzinon* oni eble opinios, ke vi havas kelkajn edzinojn, el kiuj nur unu estas bona. Sed ja ne tio estis la intenco! Diru tial tute simple *mi havas bonan edzinon*, ĉar estas ja memkompreneble, ke oni havas unu edzinon, ne du.

“*Volante speciale akcenti nedifinitecon, oni uzas la nedifinan vorton IU: Iu dana samideano skribis al mi, En iu gazeto mi trovis tre interesan artikolon.*”

La ĉi-supra teksto similas

tiun de lerneĵano, kiu, malbone prepariĝinte por kontrollaboraĵo, skribas eksterteme. Zamenhof neniam uzis unu en la funkcio de nedifina artikolo. Tiun miskomprenon kaj la rezultintan el ĝi nekonformecon inter la Zamenhofa kaj la nuna uzado Kalocsay kaj Waringhien nomis en PAG bedaŭrinda. Forigante la vorton unu el la frazo *Unu vidvino havis du filinojn*, Beaufront kaj liaj sekvantoj — inter kiuj estis gramatikistoj kaj lernolibro-aŭtoroj — senigis Esperanton je valora signifonuanilo. La parolantoj de la okcidenteŭropaj lingvoj, pro manko de tia nuancilo en sia gepatra lingvo, ne sentis bezonon de ĝia ekzisto en Esperanto. Sed tian bezonon sentas la slavoj, en kies lingvoj oni uzas ĉi-funkcie la ekvivalenton de Esperanta unu. Kaj ĝuste laŭ la rusa kaj pola uzado de la vortoj *один* kaj *jeden*, kiuj ambaŭ signifas unu (ne laŭ la franca nedifina artikolo *un/une*), Zamenhof uzis unu en la supre cititaj frazoj.

Alia afero estas, per kio Seppik proponas anstataŭigi unu en la funkcio de duondifina adjektivo. Laŭ li oni devus uzi “la nedifinan vorton iu”, sed tio ĉi estas alia miskompreno. La uzado de iu en la funkcio de determina adjektivo estas parenca al tiu de kiu. Kiel ni povas legi en PAG, iu estas determinilo elekta, do uzebla, kiam la parolanto elektas unu objekton el difinita aro da objektoj, ekz.: *iu mia amiko* (= iu el miaj amikoj), *iu verko de Goethe* (= iu el liaj verkoj), dume ia plenumas duoblan rolon: de determinilo kvalita, kiam oni aludas ies kvaliton, ekz.: *donu al mi ian leterfolion*, aŭ de determinilo maldifina, per kiu oni signas ion ne apartenantan al pli-malpli difinita grupo, do ĝi esprimas kompletan nedifinitecon. Tiun ĉi lastan signifon de ia povas illustri la sekvantaj citaĵoj el Zamenhof kaj Kabe: *legu ian verkon pri la lingvo internacia<sup>Z</sup>, Tio estas ia fripono<sup>B</sup>, tia komitato neniel povus elekti ian lingvon nacian<sup>Z</sup>,*

*Atendu, se estas eble, en ia kaŝita loko<sup>Z</sup>, ia malagrabraĵo okazis al la kronprinco<sup>B</sup>, tute egale, ĉu ĝi estos sub la formo de Esperanto aŭ de ia alia lingvo<sup>Z</sup>, mi sentas la deziron faciligi la koron per ia preĝo<sup>Z</sup>, tio estas ia fremda princino<sup>B</sup>, li estas ia strangulo<sup>B</sup>, mi en la nuna momento ne estas ia naciano, sed simpla homo<sup>Z</sup>, ĉu estis ia diferenco?<sup>B</sup>, mi ne apartenas al ia nacia aŭ partia religio<sup>Z</sup>, evitu ligi eĉ tute private la Esperantismon kun ia ideo<sup>Z</sup>, Mia vestantino volas min veneni, la frizistino, infekti min per ia malsano<sup>B</sup>, ili vidas en mi personon, kiu kvazaŭ ludas la rolon de ia reĝo<sup>Z</sup>, ia interna voĉo parolas al mi<sup>B</sup>, Maljusteco estas farata al ni tute sen ia kaŭzo<sup>Z</sup>, Pigo aŭ ia alia birdo<sup>Z</sup>, alvokita per ia sekreta maniero<sup>B</sup>, kiel ia trijara infano<sup>Z</sup>, Mi edzinigas mian filinon ne kun ia simpla nobelo<sup>Z</sup>, Mi timas, ke antaŭ lia reveno okazos al li ia malfeliĉo<sup>B</sup>, La simpla popolo, norde kaj sude, estis altirita al Ramzes per ia instinkto<sup>B</sup>, kaj en la dua orelo kvazaŭ ia demono murmuras<sup>Z</sup>, la skribisto venis en Kopenhagon al ia familio en la Gota strato<sup>Z</sup>, ni nin okupas per sensencaĵoj, diskutas pri ia arto<sup>B</sup>, videble ŝi rapidis al ia celo; ia bruliganta penso, maltrankvila espero pelis ŝin antaŭen<sup>Z</sup>, eksonis la sonorilo, anoncante la venon de ia nova persono<sup>Z</sup>, Eble hejme okazis ia malfeliĉo<sup>B</sup>, ŝi estas videble ia malfeliĉa virino<sup>Z</sup>, donu al mi, via ekscelenco, ian signon<sup>B</sup>, kvazaŭ ŝi kun granda intereso ripetadus al li ian vorton aŭ frazon<sup>Z</sup>, Li faros ĉi tie ankaŭ ian aferon<sup>B</sup>, la princo rimarkis ian malhonestajon<sup>B</sup>, Ĉe la malfermo de nia kongreso vi atendas de mi ian parolon<sup>Z</sup>, la ŝanĝiĝema junulo havas ian planon, ian celon, kiun li penos atingi kun nevenkebla obstino<sup>B</sup>, mi jam estas certa, ke la pastroj faris kun Asirio ian malhonoran traktaton<sup>B</sup>, Ĉu vi ne donos ian ordonon?<sup>Z</sup>, Mi volus fari por vi ian favoron<sup>B</sup>, Ĉiu el ili alportis al Elinjo-fingreto ian donacon<sup>Z</sup>, Donu al li ian bonan libron<sup>B</sup>, Johano rapidis, por trovi*

ian rifuĝejon<sup>Z</sup>, subite li aŭdis ekstere ian bruon<sup>Z</sup>, li balbutis ian sensencaĵon<sup>B</sup>, Tio havas ian specialan signifon<sup>B</sup>, ŝi preterpasis kelke da cigarbutiketoj, ian kafejon, ian butikon de silkaĵoj<sup>Z</sup>, Li paciencie aŭskultis lin kaj foje donis ian konsilon<sup>B</sup>, aŭ ŝi mem faras al si ian demandon<sup>Z</sup>.

Mi prezentis tiom da citaĵoj por montri, kiel multe diferencas ĉi-punkte la nuna lingvouzo disde la klasika. En la plimulto de la cititaj ekzemploj (se ne en ĉiuj) la nuntempaj Esperanto-parolantoj, ankaŭ tiuj bone regantaj la lingvon, anstataŭ *ia* dirus *iu*.

Oni ankoraŭ devas mencii, ke — priplorinde — la supre priskribitan signifon de *unu* PIV2, redaktita de Michel Duc Goninaz, deklaras arkaismo. Ŝajnas, ke pli racian kaj praktikan vidpunkton prezentas ĉi-koncerne PoMEGo de Bertilo Wennergren:

“La duondifina *unu* troviĝas en la *Fundamento*, kaj

Zamenhof sisteme uzis ĝin. Ĝi estas tre utila nuancilo, se oni ĝin ne trouzas. Iuj tamen pensas, ke tia *unu* estas nedifina artikolo uzata pro influo de naciaj lingvoj. Tial multaj hezitas uzi duondifinan *unu* timante fari eraron. Pro tio la duondifina *unu* fariĝis iom malofta nuntempe. Multaj preferas la vortojn *certa* kaj *iu*. Sed *iu* montras iom alian signifon, kaj *certa* estas multe pli emfaza ol *unu*. Tamen, kiam temas pri tempovortoj, oni ankoraŭ vaste uzadas duondifinan *unu* tute laŭ la ĉi-antaŭe montritaj ekzemploj: *unu tagon...*, *en unu vespero...*, *unu fojon...* k.s.”

Pro la unika situo de Esperanto inter la lingvoj de la mondo ĝi bezonas specialan pritrakton kaj apartan zorgon. La lernado de etnaj lingvoj efektiviĝas naturmaniere, t.e. fruinfanaĝe kaj en familio. Esperanto, male, estas plej ofte lernata de plenkreskuloj el lernolibroj en kursoj aŭ aŭtodidakte, do en kondiĉoj

artefaritaj. Ĉi tiu fakto estas tre sekvoriĉa. Dum la lernado de etnaj lingvoj estas centprocente efika, la alproprigo de Esperanto ofte estas nur parta, nekompleta kaj erarplena. Krome iuj gramatikaĵoj, pro la influo de la gepatra lingvo, povas esti misinterpretitaj kaj miskomprenitaj. Ĉio ĉi kaŭzas, ke Esperanto estas aparte elmetita al la danĝero de lingvaj devojiĝoj, kiujn oni nepre ne rajtas nomi evoluo. Tial grave estas ne ignori facilanime la lingvouzon de Zamenhof kaj de aliaj klasikuloj kaj ne anstataŭigi Zamenhofajn formojn per ne-Zamenhofaj, precipe se tiuj malriĉigas kaj komplikas la lingvon. Tio estas la devo de ĉiuj konsciaj Esperanto-uzantoj, inter ili de personoj influhavaj kaj opinikreaj: esperantologoj kaj aŭtoroj de gramatikoj kaj lernolibroj.

Edward Malewicz

**Ili jam subtenis  
la kampanjon!  
Ĉu vi sekvos  
ilian ekzemplon?**

### **Kampanjo Por deca hejmo de DEC (Listo de briko-aĉetintoj)**

|                                     |                   |
|-------------------------------------|-------------------|
| <b>En marto 2018:</b>               | <b>544 brikoj</b> |
| 12. Roža Brletić-Višnjić            | 7 brikoj          |
| 13. Marijan Benc                    | 7 brikoj          |
| 14. Muzik-ensemblo <i>Živa voda</i> | 33 brikoj         |
| 15. Velimir Piškorec                | 67 brikoj         |
| <b>En majo 2018:</b>                | <b>114 brikoj</b> |
| <b>SUME:</b>                        | <b>658 brikoj</b> |

## **Por deca hejmo de DEC!**

**AĈETU VIAN BRIKON  
KAJ KONSTRUU KUN NI!**

**Bankkonto de UZE:  
Udruga zagrebačkih esperantista  
HR7923400091110321529, BIC/SWIFT-kodo: PBZGHR2X**



aŭ: *uzes-y* ĉe Universala Esperanto-Asocio



# Sukceso per Esperanto

## (estiĝo kaj eldono de la plej nova Esperanto-lernolibro)

*Sukceso per Esperanto* estas la ĵus eldonita Esperanto-lernolibro por poloj, verkita de **Edward Malewicz**.

La nova lernolibro plenumas ĉiujn normojn, kiujn bezonas moderna lernilo de fremda lingvo en la 21-a jarcento. Sisteme kaj pripensita ĝi instruas ĉiujn kvar lingvajn kapablojn: aŭskultadon kun kompreno, paroladon, legadon kun kompreno kaj skribadon. Ĝi estas alloga kaj riĉe ilustrita, kun ĉirkaŭ 170 ilustraĵoj. Fascinas ĝiaj interesaj kaj atentokaptaj tekstoj pri neordinaraj kaj amuzaj okazaĵoj. La lernolibro enhavas abundan vortprovizojn, interalie tiun, uzatan de la juna generacio. La gramatiko estas zorgeme instruata per serio da ekzercoj kaj taskoj, kiuj vekas intereson ĉe la lernantoj.

*Sukceso per Esperanto* estas lernolibro maksimume facila kaj amika al lernantoj, kiu senĉese profundigas iliajn sciojn kaj lingvokapablojn.

La tuta kompleto de *Sukceso per Esperanto* konsistas el tri volumoj, al kiuj aldoniĝas Esperanta-pola kaj pola-Esperanta vortaro, ankoraŭ verkata. La du unuaj volumoj enhavas la materialon por komencantoj, kaj la tria, por mezprogresintoj. La tria volumo enhavas materialon malmulte konatan kaj komprenatan kaj preskaŭ neuzatan de polaj E-parolantoj: partitajn, kunmetitajn verbotempojn kaj fremdajn lingvajn konstruojn, ekz. atribuaĵajn ag-propoziciojn kaj ec-propoziciojn, perfektan kondicionalon k.a.

Ekde 2011 mi testis la lernolibron en pluraj kursoj kaj konstatis, ke ĝi estas amika ankaŭ al instruistoj. Ĉiu instruisto, eĉ sen multa sperto, kia mi estis en la komenco, dank' al tiu lernolibro ĝuste kaj korekte gvidas la lecionojn. En tio helpas la metodika pollingva konsil-libro verkita de la aŭtoro kaj senpage ricevebla en elektronika formo.

Valoras ankoraŭ aldoni, ke pozitivan opinion pri la lernolibro donis ankaŭ esperantologoj kaj filologoj, al kiuj ĝi estis prezentita, i.a. prof. **Michel Duc Goninaz**.

Dum longa tempo mankis financaj rimedoj por eldoni la lernolibron. Krome mankis, kaj plue mankas personoj, kiuj helpus profesie aspektigi ĝin. Nur amo al Esperanto kaŭzis, ke la aŭtoro kaj mi ne kapitulacis, sed venkis ĉiujn barojn kaj fine sukcesis eldoni ĝin.

Mi tre dankas al prof. **Renato Corsetti**, kiu trovis parton de la bezonata sumo ĉe **Instituto**

**Hodler '68** kaj kuraĝigis min por efektiviĝi mian grandan revon: doni al Esperantujo altkvalitan Esperanto-lernolibron. Mi ankaŭ tre dankas pro la monsubteno la **Eŭropan Centron de Interkultura Edukado** kaj la **polan sektion de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**. Fine mi dankas mian edzon, **Ryszard Komarnicki**, kiu donis la plej grandan parton de la bezonata mono.

Poloj jam delonge bezonis profesinivelan, modernan, allogan kaj efikan Esperanto-lernilon. Ĝia manko longtempe estas tre dolorige sentata. Rezulte de tio la lingvokono de multaj, eĉ multjare aktivaj polaj esperantistoj, estas katastrofe malalta. Tion konfirmas legantoj de polaj Esperanto-revuoj, oficialaj leteroj aŭ informoj. Laŭ ili, dum la lastaj jaroj, draste malaltiĝis la lingva nivelo de la uzantoj de Esperanto en Pollando.

Ĉi tiun negativan situacion ni decidis ŝanĝi per publikigo de lernolibro verkita speciale por poloj, en kiu fremdaj kaj malpli facilaj gramatikaĵoj kaj leksikeroj estas detale klarigitaj kaj intense praktikataj. Ĝuste tia lernolibro estas *Sukceso per Esperanto* de **Edward Malewicz**.

La ĝisnuna manko de lernolibro por mezprogresintoj rezultis ankaŭ je negativa percepto de Esperanto fare de seriozaj, pensantaj homoj. Iuj el ili, fininte kurson por komencantoj kaj ne havinte eblon konatiĝi kun malpli

simpla, malpli facila kaj nuancita lingvaĵo, venis al la konkludo, ke Esperanto estas malriĉa, sensinonima kaj primitiva lingvo. Tia opinio havas ekzemple profesoroj-lingvistoj el la Jagelona Universitato en Krakovo – cetere tre favoraj al Esperanto – kiuj en sia juneco lernis la lingvon, sed nur baznivelo. Ili rifuzis science ekokupiĝi pri Esperanto kaŭze de ĝia “troa simpleco”.

Por ke la lernolibro de **Edward Malewicz** komplete plenumu la bezonojn de la nuntempa lernanto, oni ankoraŭ devas surdiskigi ĝiajn tekstojn evoluigante la kapablon aŭskulti. Sen sondisko la lernolibro estos nekompleta kaj kripla. Estus ankaŭ dezirinde prilabori kaj eldoni diskon kun komputilaj interaktivaj ekzercoj, kies tasko estas ripetigi kaj plifirmigi la enkondukitajn gramatikaĵojn kaj vortojn.

Post plenumo de tiuj kondiĉoj, poloj havos lernolibron, kiu fariĝos modelo por tiaspecaj Esperanto-eldonaĵoj en aliaj landoj. Ĝi estos nia fieraĵo, ĉar en la historio de Esperanto ankoraŭ ne aperis tiel profesie prilaborita lernilo.



Per la eldono de *Sukceso per Esperanto* ni ŝanĝas la bildon de Esperanto, kiu estas ofte perceptata kiel kruda, malmoderna kreitaĵo, ĉar esperantistoj plej ofte uzas por instrui malnovmodajn lernilojn kaj utiligas arkaikajn metodojn, kvazaŭ ili timus nuntempecon kaj modernecon.

Ni invitas ĉiujn kunlabori por kompletigi la lernolibron per la menciitaj bezonataĵoj. Pri tio skribu al:

**informado.eo@gmail.com**

Fine mi aldonu, ke **Edward Malewicz**, la aŭtoro de la noveldonita lernolibro, estas magistro pri aplikata lingvistiko, diplomito de la Supera Lernejo pri Fremdaj Lingvoj de la Varsovia Universitato kaj de la Instituto pri Aplikata Lingvistiko de la Varsovia Universitato. En la lernolibro li utiligis siajn vastajn metodikajn sciojn kaj multjarajn spertojn en la instruado de la angla kaj Esperanto. *Sukceso per Esperanto* estas lia kvara Esperanto-lernolibro.

Malgosia Komarnicka



La 20-an de marto 2018 **Emile Malanda**, la kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA, ekplenumis sian planitan laborinspektan rondveturon tra diversaj regionoj de orientafrakaj landoj Ruando, Burundio kaj ambaŭ Orientaj provincoj de DR Kongo: Norda kaj Suda Kivuo. En Goma li estis gastame akceptita de **Joel Muhire** (la aŭtoro de ĉi tiu artikolo) kaj **Alphonse Waseka**. Tamen, ĉar la kongresa periodo en Burundio pli kaj pli alproksimiĝadis, li inversigis sian vojaĝitineron kaj kune kun mi, anstataŭ iri al Burundio, li veturis tra Ruando. En Rumonge afable akceptis nin **Jérémie Nsabiyumva**, kaj lia edzino regalis nin per vere satiga manĝo! Matene, antaŭ ol forveturi al la kongresa urbo Nyanza-lac (Nyanza-lago), kun Jérémie Nsabiyumva ni vizitis la Esperanto-centron de Rumonge.

En Nyanza-lac, Burundio, okaze de la 3-a Nacia Kongreso de Esperanto (26-a de marto – 1-a de aprilo), **Emile Malanda** prelegis pri la temo *Kiel fondi kaj pluivigi Esperanto-klubon* kaj pri la strukturo de la Esperanto-movado ĝenerale. Li ankaŭ klarigis kiel konduki en Esperantujo kaj kuraĝigis la kongresanojn. En tiu kongreso partoprenis 74 geesperantistoj el Burundio, DR Kongo, Tanzanio, Zambio kaj Sudafriko. Dum la kongreso okazis baznivela kurso por 80 gekomencantoj, el kiuj 76 sukcese trapasis la ekzamenon. Kongresfine, **Emile Malanda** kaj mi, akompane de 3 uviraj esperantistoj, forveturis al Uvira, DR Kongo. En Uvira efektive ne ekzistis alia klubo ol *Zilbernik Esperanto-klubo* (ZEK) de s-ro **Bukuru Nabahena** el Kiliba, situanta 15 kilometrojn for. Post diversaj laborkunsidoj kun kelkaj aktivuloj, kreiĝis *Esperanta Klubo de Uvira* kun **Sosthène** kiel prezidanto. En la centro de Uvira, apud la vojo, fontas varma akvo, en kiu eblas eĉ kuiri terpomon. Ĝi estas ege mirinda fenomeno. De Uvira

al Bukavu ni trairis la plej danĝeran ebenaĵon Ruzizi, en kiu banditoj embuskas apud la vojo por prirabi vojaĝantojn. Ĉe la bushaltejo en Bukavu atendis nin s-ro **Mana Brinson**, kiu gastigis nin en sia hejmo. Li rakontis al ni mallonge pri la Esperanto-movado en tiu urbo kaj montris al ni sian Esperanto-bibliotekon, sed pro nesufiĉa tempo ni ne restis longe!

La postan tagon ni enŝipiĝis kaj forveturis tra la lago Kivuo al Goma (en la provinco Norda Kivuo), kaj poste motorbikle vojaĝis al Rutshuru, 80 kilometrojn for de Goma. En Rutshuru **Emile Malanda** havis la okazon viziti diversajn klubojn, ekz. Verda Stelano-Klubo, Rondo Esperantista de Kiwanja kaj Kasasa Esperanto Klubo. Li ankaŭ vizitis mian familion. Li estis intervjuita pri Esperanto de la ĵurnalistoj de la radistacioj RACOVE FM kaj RTEDH FM. Bedaŭrinde, pro la nuntempa ekstrema malsekureco, por ne riski esti rabita de malbonintencaj monaviduloj, Emile ne konsentis partopreni en mia lunda Esperanto-elsendo. Mia klubo Rondo Esperantista de Kiwanja (REK) kore dankis la kunordiganton Emile Malanda pro la t-ĉemiza donaco.

Post 5 tagoj Emile finis sian mision en tiu danĝerplena regiono de Kongo. Mi akompanis lin por certiĝi pri lia senproblema vojaĝo ĝis la urbo Goma ĉe **Alphonse Waseka**, kie li ankaŭ restis kelkajn tagojn laborkunsidante kun la membroj de Solidareco Bona Volo (SBV).

La vojaĝo de la afrikkomisiona kunordiganto de UEA estis sukcesa kaj fruktodona malgraŭ diversaj malfavoraĵoj dumvoje. Ni kore dankas s-ron Malanda pro lia braveco kaj revigligo de la Esperanto-movado en la vizititaj lokoj, kaj ripetas, ke venontokaze li revenu en nian regionon!

Joel Muhire





Jam de jaroj la francaj esperantistoj invitas fremdlandajn samideanojn rondvojaĝi kaj prelegi en Francio. Mi tre ekĝojis, kiam mi ricevis retleteron de la konata franca esperantisto **Yves Nicolas**, kiu proponis al mi prelegi dum unu monato, vizitante diversajn francajn urbojn. Yves skribis, ke li konas miajn Esperanto-librojn kaj ke estus bone, se francaj esperantistoj konatiĝus kun mi kaj havus eblecon aŭdi miajn prelegojn pri la originala Esperanto-literaturo kaj la bulgaraj historio kaj artkulturo. Iom da tempo mi hezitis akcepti tiun ĉi proponon. Mi neniam estis en Francio kaj mi opiniis, ke estos malfacile vojaĝi dum tuta monato en nekonata lando. Yves tamen konvinkis min, dirante, ke mi ne devas maltrankviliĝi ĉar ĉio estos bone organizita.

La 28-an de majo 2018 (lunde) la aviadilo per kiu mi veturis, alteriĝis en la pariza flughaveno *Charles de Gaulle*, kie atendis min la simpatia kaj tre kara esperantistino **Marianne Pierquin**. Post mallonga trarigardo de Parizo, Marianne kaj mi venis al la sidejo de *Espéranto France* en la strato Cerisaie (Ĉerizejo), kie okazis mia unua prelego. Ĝia temo estis *La nuntempa bulgara artkulturo*. Post la prelego mi devis respondi al pluraj demandoj pri Bulgario, pri la bulgara nuntempa vivo, pri la enlanda Esperanto-movado, pri mia verkaro en Esperanto kaj pri miaj plej novaj Esperanto-libroj, kiujn eldonis Dokumenta Esperanto-Centro en Ĝurđevac (Kroatio).

La 29-an de majo (marde), mi veturis trajne al Bruselo. Tie atendis min **Françoise Pellegrin** kaj **Nicolas de Buyl**, kiuj organizis por mi mirindan promenadon tra la urbo. Mi delonge revis vidi la ĉefurbon de Eŭropa Unio kaj nun tiu mia revo realiĝis dank' al Esperanto.

La du tagoj, kiujn mi pasigis en la belega ĝardeno domo de Françoise kaj ŝia edzo Patrick, estis tre emociigaj. Ni multe konversaciis pri diversaj interesaj temoj. La 30-an de majo (ĵaŭde), Françoise veturigis min aŭte al la fama muzeo de Waterloo, kiu forte impresis min. En Bruselo mi prelegis pri la nuntempa bulgara artkulturo kaj pri la plej allogaj bulgaraj urboj ĉe la Nigra Maro.

La 31-an de majo mi veturis al Strasburgo, kie atendis min sinjoro **Bernard Pidancier**, serioza esperantisto kaj matematikisto, prezidanto de la strasburga Esperanto-klubo. La 1-an de junio mi trarigardis la urbon kun sinjoro **Bernard Reipfsteck**, kaj vespere mi prelegis pri la bulgaraj urbo ĉe la Nigra Maro.



*En Strasburgo*

La 2-an de junio (sabate) mi ekvojaĝis trajne al Liono, kie mi gastis ĉe sinjoro **Mikaelo Leibman**. Sinjoro Leibman montris al mi la belegan ĉirkaŭaĵon de Liono: romantikajn urbetojn, allogajn kastelojn kaj preĝejojn, la malnovan kvartalon de la granda urbo, fama pro la iama produktado de silko. En Liono mi parolis pri la nuntempa bulgara artkulturo.

La 5-an de junio (marde) mi veturis al Marsejlo. Pri tiu ĉi mediteranea urbo mi legis librojn, spektis francajn filmojn kaj mi tre deziris iam viziti kaj vidi ĝin. Kun la konata esperantistino **Renée Triolle** mi trarigardis la urbon, vizitis la imponan katredalon, kaj vespere okazis mia prelego pri la bulgara nuntempa kulturo.

De Marsejlo kun sinjorino Triolle mi veturis al ŝia domo en la urbo La Ciotat, belega domo en bosko, de kie videblas la senlima mediteranea maro. La Ciotat ravis min per la blankaj domoj kaj konstruaĵoj kaj la pitoreska mara bordo. En la urbo naskiĝis la famaj fratoj Lumiere, la kreintoj de la kinoarto. En La Ciotat mi denove prelegis pri la nuntempa artkulturo. Evidente tiu ĉi temo tre forte interesis la francajn esperantistojn. Mi konstatis, ke tre malmultaj inter ili konas Bulgarijon kaj preskaŭ nenion scias pri la bulgaraj kulturo, arto kaj literaturo.

De La Ciotat la 7-an de junio (ĵaŭde) mi veturis al Monpeljeo, tiu fama franca urbo, en kiu estis fondita la unua medicina universitato. En Monpeljeo mi gastis ĉe la kara Esperanta familio de **Monique**

kaj **Serge Eysseric**. En ilia vasta kaj moderna domo kolektiĝis ĉiuj anoj de la loka Esperanta, kaj la dommastroj regalis nin per tre bongustaj manĝaĵoj. La sekvan tagon, post la trarigardo de la urbo, mi prelegis pri la plej allogaj bulgaraj urboj ĉe la Nigra Maro.



*En Monpeljeo*

De Monpeljeo la 9-an de junio (sabate) mi veturis al Carcasson, kiu troviĝas en la pitoreska regiono Ariège. Tie la konata franca esperantisto **Jorgos** organizis por mi riĉan programon. Mi konatiĝis kun kelkaj francaj verkistoj, kiuj interesiĝis pri la Esperanta literaturo, pri miaj Esperantaj libroj kaj starigis al mi plurajn demandojn pri Esperanto kaj la Esperanta kulturo. Jorgos kaj mi havis la eblecon vaste informi ilin kaj la ĉeestantojn pri Esperanto.

La 12-an de junio (marde) aŭtobuse mi veturis al Tuluzo, kie mi gastas ĉe la tre kara Esperanta familio de gesinjoroj **Jeanne-Marie** kaj **Richard Cash**. En Tuluzo mi prelegis pri la originala Esperanto-literaturo. Tie la geesperantistoj el la Esperanto-klubo estis la unuaj, kiuj deziris aŭdi mian prelegon pri tiu temo. Ilia intereso estis tre granda, kaj multaj el ili aĉetis miajn novajn librojn kaj starigis al mi plurajn demandojn pri miaj romanoj, novelaroj kaj dramoj.

La 14-an de junio (ĵaŭde) mi veturis al urbo Brive, kie atendis mi geesperantistoj el Brive kaj el la proksima urbo Perigueux. La esperantisto **Claude Labetta** veturigis min al la urbo Perigueux, kie li loĝas, kaj dumvoje ni haltis por viziti la faman groton Lascaux. En ĝi estas pentraĵoj de prahomoj kiujn, laŭ la sciencistoj, oni pentris antaŭ 17.000 jaroj. La groto verŝajne estis religia sanktejo, en kiu la prahomoj adoris bestojn: ĉevalojn, bizonojn, cervojn, aprojn.

La 16-an de junio (sabate) en Perigueux mi prelegis pri la bulgara historio kaj Bulgario kaj mi devis

respondi al pluraj demandoj. Dum la prelego ĉeestis sinjoro **Gilles Tabard**, prezidanto de la Esperanto-klubo en Brive. Post la prelego li veturigis min aŭte al Brive, kie mi prelegis en la urba kulturdomo, kaj la temo de la prelego denove rilatis la bulgaran historion kaj Bulgaron.

En la domo de sinjoro Tabard mi pasigis du neforgeseblajn tagojn. Li veturigis min al proksimaj belegaj urbetoj, kie mi vizitadis katedralojn, kastelojn, templojn. Akompanis nin sinjorino **Isabelle Jacob** el Limoges.

La 18-an de junio (lunde), kun sinjorino Jacob mi veturis al Limoges, fama pro la artoj de gobelinoj kaj fajnaj porcelanaĵoj. En Limoges la temo de la prelego estis Bulgario.

La 19-an de junio (marde), kun sinjorino Jacob mi veturis al Châteauroux, kie atendis nin sinjorino **Maryvone Houvriez**, prezidantino de la Esperanto-klubo kaj lokaj esperantistoj. Ni trarigardis la kastelon, en kiu loĝis kaj verkis la fama verkistino George Sand. La sekvan tagon sinjorino Houvriez veturigis min al la romantika urbeto Gargilesse, kie troviĝas la domo de George Sand, en kiu ŝi pasigis la lastajn jarojn el sia vivo. En Châteauroux mi prelegis pri la nuntempa bulgara artkulturo kaj pri la plej allogaj bulgaraj urboj ĉe la Nigra Maro. La sekvan tagon sinjorino Houvriez montris al mi la urbon kaj mi trarigardis la rimarkindajn monumentojn de Châteauroux.

La 21-an de junio (ĵaŭde) mi veturis trajne al Parizo, kie denove atendis min **Marianne Pierquin**. Tiun ĉi tagon en la franca ĉefurbo okazis la festo de la muziko. Sur la stratoj muzikludis pluraj orkestroj kaj kantis korusoj. Estis bonege promenadi kaj ĝui la muzikon. En la tuta urbo regis festa etoso. Mi multe vagis kun Marianne kaj la esperantistino **Laure D'illiers**.

La 22-an de junio (vendrede), kun **Éric Eliarde** mi trarigardis Parizon. Ni estis en la Nacia Biblioteko, en la katedralo Sacre-Coeur sur la monteto Montmartre, en la muzeo de Salvador Dali, en la teatro *La Comédie-Française* kaj en aliaj muzeoj. Vespere en la sidejo de SAT-amikaro mi prelegis pri la originala Esperanto-literaturo.

La 23-an de junio (sabate) mi ekveturis al Sofio. Al la flughaveno akompanis min la kara kaj afabla Marianne.

Mia Esperanta rondvojaĝo en Francio estas neforgesebla. Tie min ravis la granda Esperanta solidareco kaj amikeco. Ĉie la geesperantistoj renkontis kaj gastigis min ege kore kaj amike. Ilia profunda afableco kortuŝis min. Mi ne scias ĉu en aliaj landoj la geesperantistoj organizas similajn rondvojaĝojn, sed laŭ mi la franca rondvojaĝo estis tre utila ne nur por mi, sed same por la francaj geesperantistoj, kiuj havis la eblecon pli bone ekkoni Bulgaron, la originalan Esperanto-literaturon kaj praktiki la lingvon. Tiu ĉi rondvojaĝo ankoraŭfoje montris al mi, ke Esperanto estas la plej unika lingvo en la mondo.

*Julian Modest*



# Mi stelojn jungos al revado ...

Eŭgeno Miĥalski (1897-1937)

## Sur la Parnaso de la proleta skolo

*Miĥalski flirta papilio  
Rapsodo de l' printempa viv'  
Se lin turmentas kis-soifo  
Konsolas lin la rim-ebrio*

*Sed ofte akras lia krio  
Laŭ fajfo de lokomotiv'  
Miĥalski flirta papilio  
Rapsodo de l' printempa viv'*

*Kaj – jen la ĉefa antaŭ ĉio  
Fieras li (ne sen motiv')  
Pri la malkovro ke pasiv'  
Dialektikas kun pasio*

*Miĥalski, flirta papilio*

Kálmán Kalocsay,  
*Rimportretoj*




*Verdaj ondoj trabatas graniton,  
ĉion voje forportas kun si,  
al Malnovo deklaras militon,  
belkantante en mova pasi'.  
Verdaj ondoj kunportas fervoron,  
flamigante per nova rimed',  
donas povon, instigas laboron,  
pligrandigas fortecon de l' kred',  
ŝprucas akveroj de l' Helo,  
ŝprucas tra la universo;  
brilas perleroj de l' Belo,  
ŝutas kolorojn en verso.  
Kantas la ondoj pri Vero,  
diras pri fin' de turmento...  
Vokas la plena libero  
verda libera torento.*

Tamen baldaŭ Miĥalski kun fervoro aliĝos al konstruado de la nova socio post 1917. Spurojn de tiu anima ŝanĝo oni trovas en la poemciklo *Fajro*:

*En sang' naskiĝas Amo. El fajr' aperos Vero.  
Kaj Belo ekradios el post densega fum'.  
Post neniig' disfloros denove tuta tero.  
Post longa prema nokto ekbrilos fine Lum'.*

Eŭgeno Miĥalski naskiĝis la 21-an de januaro 1897 en la ukraina urbeto Letiĉev. Siajn infanajn jarojn li pasigis en Mendziboŝ, kie vivis la fama ĥasida cadiko kaj kie lia patro trovis laboron ĉe ĵura prokuristo, kaj poste en apoteko. En tiu ĉi urbeto vivis miksite, sed aparte poloj, rusoj, judoj kaj ukrainoj. Pro sufoka etoso de klaĉoj kaj reciprokaj akuzoj Eŭgeno estis sendita al Voznesensk, kie li lernis en la vira gimnazio. Ĝuste tie, en la biblioteko, li trovis Esperantan lernolibron de Devjatnin, kaj multajn jarojn poste li skribos jene pri sia unua renkontiĝo kun la internacia lingvo: „*La versoj, kiujn mi tralegis en libro: estis la Himno. La ideo de l' Himno min kaptis, la versharmonio min ravis*”.

Kiam eksplodis la unua mondmilito, la juna Miĥalski estis vokita samkiel liaj gimnaziaj kolegoj al militservo, kaj en 1916 li venis al la Ĥarkova milita lernejo. Post la februara revolucio (1917) li transloĝiĝis al Saratov, kie li komencis verkadon kaj tradukadon el la rusa literaturo. Li estis kunfondinto de la revuo *Libera torento* (1918). Sur ĝiaj paĝoj li debutis per siaj poemoj. Samjare oni aperigis la poemaron *La unua ondo* kun versaĵoj de E. Miĥalski kaj V. Polĵakov. Rimarkindas la poemo *Torento*, kiu prezentas la pensojn de la juna poeto pri la graveco de Esperanto kaj ĝia literaturo, kaj samtempe fluecon de la poezia frazo kaj lertecon en la elekto de taŭgaj esprimrimedoj, kio malkaŝas la veran majstron.



Okazis ankaŭ grava ŝanĝo en lia vivo – li edziĝis al Olga Bojko en Voznesensk (1918). Post la nupto la juna paro transloĝiĝis al Ĥarkovo, kie du jarojn poste naskiĝis la filino Aleksandra, kiun sekvas la gefratoj Anatolij (1922), Alla (1924) kaj Eŭgeno (1926).

Post 1922 Miĥalski ekloĝis kun siaj familianoj en Odeso kaj komencis viglan agadon en la proleta Esperanto-movado. En aŭgusto 1926 li ĉeestis du sinsekvajn okazaĵojn en Sankt-Peterburgo: la 3-an Tutsovetian Esperanto-Kongreson kaj la 6-an SAT-Kongreson, okaze de kiu aperis poŝtmarko, kaj la partoprenantoj marŝis tra stratoj de la urbo, sub verdaj standardoj. Forte aŭdiĝis la vortoj el la kongresa parolado de Drezen: „*Esperanto fariĝis potenca ilo en la manoj de la revolucia laboristaro volanta renversi la nunan sociordon kaj starigi sociordon novan, pli bonan kaj pli feliĉan por ĉiuj homoj...*”

Estis la finaj jaroj de ia pliliberigo pro NEP, kio evoluigis industrion kaj terkulturaron. Tiu evoluo manifestiĝis ankaŭ en la kultura vivo, precipe en la literaturo kun Izaak Babel, Osip Mandelŝtam, Anna

Aĥmatova kaj Boris Pasternak, sed ankaŭ en la filmarto kun Sergej Eĵenŝtejn. Ĝuste en tiu favora klimato povis ankaŭ disvolviĝi la Esperanto-movado.

Tamen la partia gvidantaro bridos ĉiujn simptomojn de libereco. En julio 1925 la Centra Komitato akceptis la rezolucion pri la aŭtoritato de la Kompartio super la literaturo. Aŭtune de 1927 komenciĝis la ekonomia krizo pro la rompo de la NEP-a politiko, kaj Stalin eluzos ĝin por la milito kontraŭ internaj kaj eksteraj malamikoj. De aprilo 1929 oni persekutadis laŭplane kaj organizite ĉiujn oponentojn de la Stalina reĝimo.

Ĝuste en ĉi tiu jaro aperis la poemaro de Miĥalski *Prologo*, kiun en Parizo aperigis SAT, en 2000 ekzempleroj. Ĝi enhavas poemojn, kiuj prezentas la intiman mondon de la aŭtoro, kaj la titolo mem estas signifa por la okazontaj ŝanĝoj, kiuj sekvis post la revolucio. Kiel strange devis aŭdiĝi tiuj poetaj vortoj, kiam en la lando oni murdadis centojn da honestaj civitanoj, kaj en Ukrainio mortadis miloj da kamparanoj pro malsatego, kiun Stalin eluzis kiel politikan batalilon.

*Finigis nokto. En ĉirkaŭprenu  
ci kisas min, karesas, flustras kun pasio.  
Susuras silko sur kuseno...  
Maten' de l' am', de l' tag' mateno –  
Unua ora sunradio  
pentras ĉambron tra kurteno...  
Okulojn ci fermetas, dronas en ebrio...  
Leviĝas mi, malfermas pordon al ĝardeno...  
Parfumas mole akacio...  
Kaj ĉio vokas, logas al promeno;  
kaj spiras vera poezio  
en tiu ĉi vilaĝ-edeno.*

(el *Amaj melodioj*)

Responde al la atakoj de siaj kritikantoj, Miĥalski aperigos en la eldonejo *Ekrelo* la poemaron *Fajro kuracas* (1932), kiu enhavas la plej politikajn poemojn de la aŭtoro kaj en kiu oni vidas ĉe li personajn transformiĝojn „el individueco al kolektivismo”, „el anarĥio al konkorda interdependo” kaj „el senkonscia baraktado” al „celkonforma batalado”, kion oni riproĉadis sur la paĝoj de la gazeto *La Nova Epoko*. Tiuj poemoj, skribitaj en la jaroj 1930-1931, samtempe estis provo de saviĝo antaŭ persekutado.

Fine de 1931 Miĥalski kun Ludwig Renn fondis IAREV (Internacia Asocio de Revoluciaj Esperantaj Verkistoj). Kiam Renn estis arestita (1933) en Germanio kaj fuĝis al Hispanio, por batali tie kontraŭ trupoj de generalo Franco (1936), IAREV estis gvidata de Miĥalski kun Kuzmiĉ, Izgur, Usmanov, Nekrasov kaj Bourguignon. Kiel organoj de IAREV aperadis *Nova Etapo* (1931-1933), *Proleta Literaturo* (1934) kaj *Internacia Literaturo* (1935). Eldonado de ĉi tiuj

revuoj, kies redaktoro fakte estis Miĥalski, kunpuŝiĝis kun obstakloj, kiujn multobligis la komunistaj regantoj. La unua numero de *Proleta Literaturo*



(1934) malplaĉis al la Kongreso de Sovetiaj Verkistoj. Tio estis averto. Miĥalski komencis laboron pri la epopeo *Forĝejo de l' Homoj*, en kiu li „montras, kiel en Sovetio oni edukas per laboro personojn, kiuj estas ĉu krimuloj, ĉu prostituinoj, ĉu politik-malamikoj”. Tiel li skribis en *Internacia Literaturo* (1935). Kiel ĉeftemo por lia epopeo devus esti konstruo de la 227 kilometrojn longa kanalo inter la maroj Blanka kaj Balta, kiun duonmiliono da malliberuloj elfosis mane. En la sama revuo-numero li anoncis, ke li ekverkis originalan romanon *Nia vojo*, kiu „disvolvos bildojn de la etapoj en la esperanta movado: for de ‚neŭtrala’ esperantismo al esperantismo revolucia”.

Miĥalski laboregis, kvazaŭ li antaŭsentus sian baldaŭan morton. Li tradukis poemojn de la ukraino Ŝevĉenko, de la ruso Puŝkin, kaj de la pola revolucia poeto Broniewski. Li anoncis, ke li komencis laboron super *Esperanta sinonimaro*, kaj manuskripte estis preta la ruslingva verko *Skizoj pri teorio kaj praktiko de esperanta traduko*, aperigota ankaŭ en Esperanto. Li konfirmis, ke li esperantigis la romanojn *Kiel hardiĝis ŝtalo* de Ostrovskij, *Virga kampo* de Ŝoloĥov kaj *Milito kaj Paco* de Tolstoj, kiun li finis traduki ankoraŭ en 1929.

En 1934, respondante al la postulo de N. Ŝapiro, ke „la enhavo estu senpolitika”, li aperigis en Varsovio sian poemaron *Kantoj de Amo kaj Sopiro*. Estas la kolekto de la plej fruaj poemoj de Miĥalski, kiujn li verkis en la jaroj 1917-1919.


Por la semantoj de teroro en Sovetio de la 1930-aj jaroj ĝuste la agado en IAREV kaj tiu poemaro, kiun li eldonis en la malamata, burĝa Pollando, estis signalo por ekigi persekutadon. La 16-an de marto 1937 oni arestis la poeton, kaj en majo prezentis la akuzon, ke li estas gvidanto de kontraŭrevolucia organizaĵo, kaj en IAREV kaŝiĝas kontraŭsovetiaj trockiistoj. Al la „kulpo” aldoniĝis la poleco de lia patro, soldatservo en la blanka armeo kaj kunlaboro kun eksterlanda (pola!) eldonejo. Por Miĥalski komenciĝis la geheno. Horoj da pridemandadoj kaj ankaŭ da kruelaj torturoj. Komence li rezistis, sed kun tempopaso li subiĝis kaj poste li „konfesis” la nomojn de la homoj, kiujn li varbis por sia „trockiista subplanka organizaĵo”, kio rekte venigis ilin antaŭ la ekzekutan plotonon.

Baldaŭ estis arestita Drezen kaj multaj kievaj kaj ĥarkovaj esperantistoj. Ili komencis denunci unu la alian. Kontraŭ Miĥalski sian denuncon prezentis Kuzmiĉ el IAREV, ke la gazeto *Proleta literaturo* estis ilo de ĝia fondinto Miĥalski kaj lia amiko, franca trockiisto Bourguignon, por ke li povu enpenetri en Sovetion. Denuncis lin eĉ lia Esperanta lernanto! Kelkaj el tiuj, kiujn denunciis la turmentata Miĥalski,



faris la samon kontraŭ li. Tiel fermiĝis la cirklo da reciprokaj akuzoj kaj suspektoj. La muelŝtonoj de NKVD senkompate dispistis la vivon de la homoj, kiuj iam klopodis efektiviĝi la Zamenhofan idearon. La sorto de Miĥalski estis sigelita. „*Laŭ verdikto de Milita kolegio de l' Supera Juĝistaro de USSR de la 14-an de oktobro 1937 [li] estis verdiktita al V.M.U.N. [ruse: „La plej alta mezuro de krimpuno”] – mortpafo. La verdikto estis plenumita la 15-an de oktobro 1937 en u. Kievo*”... (el la arkivo de KGB). Nur en 1958 oni rehonorigis lin per la tribunala verdikto, kaj en 1994 aperis lia *Plena poemaro: 1917-1937* (FEL, Antverpeno, en la serio „Stafeto” n-ro 18).

Tomsz Chmielik



El la volumo *Prologo* (1929)

### *Mi stelojn jungos*

*Mi stelojn jungos al revado,  
kaj ili portos min tra bluo  
en landon de la nemortado,  
de la eterna vivo-ĝuo.  
Do, arogantu mia kanto,  
do, akresonu mia verso.  
Mi estas forto kaj giganto  
Kaj regontul' de l' universo.  
La morto?! Ho, ĝi plu ne tedos,  
restinte sole nur simbolo;  
je l' universo nur procedos  
la menso de l' scienca volo.*

Voznesensk, 26 Oktobro 1921

## Surloke de grandaj eventoj

### Vizite al Beogrado, majo 2018



Beogrado rigardata el Kalemegdano

Sur mia listo de vizitotaj urboj jam delonge troviĝis Beogrado, kiu en la Esperanta historio de eksa Jugoslavio havis tre gravan rolon. La ŝanco por viziti ĝin montriĝis inter la 18-a kaj 20-a de majo.

Mi interkonsentis renkontiĝi kun kelkaj lokaj esperantistoj, cetere miaj bonaj konatoj kaj multjaraj amikoj. Malfeliĉe, temis pri la semajnfino, kiam en Beogrado okazadis la korbopilka turniro *Final Four 2018*, en kiu partoprenis la plej bonaj teamoj de Hispanio (*Real Madrid Baloncesto*), Rusio (*CSKA Moskvo*), Turkio (*Fenerbahçe Ülker* el Istanbul) kaj Litovio (*Krepšinio klubas Žalgiris* el Kaunas).

Semajnojn antaŭ tiu turniro ne eblis trovi liberan lokon en la beogradaj hoteloj kaj mi estis tre danko al **Zlatoje Martinov**, kiu sukcesis rezervi por mi surlokan loĝadon en privata hostelo *Kavala*. La 18-an de majo Zlatoje atendis min en la busa stacidomo de Beogrado, de kie per publika transporto ni direktiĝis al la menciita hostelo en la urba kvartalo Zemun.

La stratoj kaj urbaj transportiloj estis plenplenaj de diverslandaj kibicoj kaj policaj patroloj, kaj en tiu tumulto por la unua fojo en la vivo mi estis priŝtelita de poŝtelisto! Feliĉe (se oni povas tiel diri en simila okazo), temis nur pri la sumo tiutage ŝanĝita al serbaj dinaroj, dum la resto de mia mono, kreditkartoj kaj personaj dokumentoj restis en sekura loko.

Per tiu ŝtelo ne estis finitaj miaj tiutagaj problemoj en Beogrado. Veninte al la hostelo *Kavala* montriĝis, ke ĝi estas fermita, kaj cetere ĝin komplete okupis iu turka kibica grupo. La posedanto pente telefonis al ni, ke je lia kosto ni trinku ion en la apuda trinkejo, kaj poste li venis, same pente prenis en la manojn mian valizon kaj gvidis nin al alia hostelo, kie li sukcesis trovi lokon por mi. La alia hostelo estis eĉ pli bonkvalita, lokita en pli bela parto de la urbo, kaj tamen mi pagis la saman prezon, ĉar la reston de la reala prezo kompensis la malfeliĉa hostelisto kiel signon de sia bedaŭro.

Tiuvespere Zlatoje kaj mi renkontiĝis kun **Dimitrije Janičić**, mia malnova beograda amiko, kaj ni pasigis agrablajn horojn en konversacio kaj bierumado en la urbocentra trinkejo *Sunce* (Suno), iam famega restoracio, vizitata de politika kaj kultura elito de la urbo.

La ĉefa tago de mia vizito tamen estis sabato, la 19-an de majo. Kiel interkonsentite, tiutage antaŭtagmeze Zlatoje kaj mi vizitis la malnovan kaj malsanan samideaninon **Etelka Jakupović** en Zemun (pri kio mi skribis pasintnumere), al kies domo veturigis nin Nemanja, la filo de Zlatoje.

Dum mia restado en Beogrado mi nepre volis ekscii iomete pri la nuna stato de Esperanto, kaj ĉiuj ricevitaj informoj atestas, ke ĝi estas treege malbona. Iam en Beogrado funkciis pluraj societoj, kaj por illustri la nunan staton, mi mencias nur du el ili. Kiel konate, en la urbokvartalo Zemun iam funkciis

tre forta kaj bone organizita Esperanto-societo, fondita antaŭ la unua mondmilito. Nuntempe ĝi praktike ne plu ekzistas, kaj malgaje aspektas ankaŭ la lokoj, kie okazadis la societaj aktivecoj. Unu el tiaj lokoj estas la neglektita domo en la strato Karamatina, nemalproksime de la jam menciita hostelo *Kavala*.



*Iama societejo de Zemun*

La alia loko estas la ruiniĝinta *Hotelo Central*, en kiu okazadis kunvenoj de la zemuna Esperanto-societo *Mojsije Pajić* (fondita en 1924), kiun mi sukcesis fotti frumatene la 20-an de majo, forlasante Beogradon.

Se oni parolas pri Esperanto en Beogrado, oni ne rajtas forgesi la plej grandan kaj



*Zlatoje Martinov montras la ŝildojn de Serbia Esperanto-Ligo kaj Esperanto-societo Radomir Klajić en Terazije 42*

plej fortan societon, kiu portis la nomon de **Radomir Klajić**, pioniro de la tiea movado. Tiu societo longtempe havis sian sidejon en la ĉefa beograda turisma kaj komerca strato Terazije. La adreso *Terazije 42* en Beogrado, estis same grava por la serba esperantistaro, kiel la adreso *Amruševa 5* en Zagrebo por la kroataj esperantistoj. Krom la Esperanto-societo *Radomir Klajić*, tie funkciis la sidejoj de Serbia kaj Jugoslavia Esperanto-Ligoj. La komuna ejo de beogradaj esperantistoj fakte troviĝis en la korta parto de tiu loko, atingebla



*Terazije 42: enirpordo*



*Hotelo Central en Zemun, iama kunvenejo de esperantistoj*

tra la koridorforma pordego. Gvidita de **Zlatoje Martinov** mi vizitis tiun lokon, sed ni konstatis, ke nun pri la iama glora tempo de Esperanto en Beogrado atestas nur la tri kestetoj sur la ekstera muro, en kiuj videblas la fotoj de la pioniroj **Radomir Klajić** kaj **Momčilo Šaponjić**, kaj apud kiuj troviĝas nur la forgesitaj ŝildoj de Serbia Esperanto-Ligo kaj Esperanto-societo *Radomir Klajić*. Kiel multaj aliaj domoj en la postsocialisma tempo de la eksa Jugoslavio, ankaŭ la domo en Terazije 42 estis redonita al privata posedanto, sed restis neloĝata.



Min aparte interesis la sorto de la societa kaj ligaj bibliotekoj kaj arkivoj, sed neniu kapablis al mi diri, kio pri ili okazis. Ĉu ili dividas la saman malfeliĉan sorton kun aliaj arkivoj de niaj societoj kaj asocioj, aŭ en Serbio troviĝis konsciaj esperantistoj, kiuj savis ilin? Pri tiu temo antaŭ pluraj jaroj, kiam estis evidente ke la esperantistoj devos forlasi la adreson Terazije 42, mi interparolis kun Tereza Kapista, sed poste nenio okazis, ĉar Tereza forpasis. Eble ankoraŭ ne estas malfrue serĉi la arkivojn de serbaj esperantistoj, kiujn Dokumenta Esperanto-Centro en Ĝurđevac volonte akceptus kaj konservus. Sed pri tio, same kiel pri la arkivo de la enlanda Esperanto-Instituto, kiun iam gvidis **Boriša Milićević**, devas decidi la serbaj esperantistoj mem.

Serbia Esperanto-Ligo ŝajne jure ne ekzistas. Klopodis ĝin registri laŭ la novaj leĝoj **Adem Jakupović**, la edzo de Eteka el Zemun, kiun mi vizitis dum mia restado en Beogrado, sed post lia forpaso ŝajnas, ke ankaŭ tio restis nefinita afero.

Grupo da lokaj esperantistoj anstataŭ la Esperanto-societo *Radomir Klajić*, en 2011 fondis novan societon kun sonora nomo *Nova sento*, kies unu prezidanto estis Zlatoje Martinov (2011-2014). Ĝia unua sidejo troviĝis en

la strato Maršala Birjuzova 58, en la tiea Loka komunumo. Nun ĝi funkcias en alia loko, sed ankaŭ ĝi estas relative malgranda kaj malforta.

Sabate mi havis ankoraŭ unu agrablan taskon: renkontiĝi kun **Ljiljana Sekelj Milenković**, la filino de **Antonije Sekelj** (cetere frato de Tibor), por definitivigi la baldaŭan publikigo de *La ponto super Drino* de la Nobelpremiito Ivo Andrić, kiun tradukis ŝia patro. Ekde 1964 daŭras la odiseado de tiu traduko, kaj apenaŭ nun montriĝis la ebleco aperigi ĝin. Kun Ljiljana mi renkontiĝis en la jam menciita

kafejo *Sunce*, post agrabla promeno sur Kalemegdano. Tre rapide ni solvis la dubajn lokojn en la manuskripto, kiuj turmentis nin ekde 2015, kiam la manuskripton por publikigo transprenis Dokumenta Esperanto-Centro.

Sabaton mi finis en amika rondo de Zlatoje kaj Dimitrije, en malgranda kaj agrabla trinkejo, apud Bierglasoj.

Dimanĉe, la 20-an mi forvojaĝis el Beogrado kun multaj agrablaj memoroj, sed ankaŭ kun la morna perspektivo de la serbia Esperanto-Movado.

*Josip Pleadin*



*De maldekstre Zlatoje Martinov, Josip Pleadin kaj Dimitrije Janičić dum la sabata „kunsido” en beograda trinkejo.*

## Komisiono de UEA Meza Oriento kaj Norda Afriko

# Ĉu vi volas la disvastigon de Esperanto en Meza Oriento kaj Norda Afriko?

Temas pri problema regiono, en kiu estas malpacoj diversspecaj, kaj tie Esperanto kaj justaj internaciaj rilatoj per Esperanto povus helpi pli ol en aliaj mondopartoj.

En la lasta jardeko ni atingis kelkajn rezultojn (vidu la paĝaron <http://www.esperanto.net/ar/>, la serion de niaj Mezoriantaj Kunvenoj, la lernolibron en la araba, ktp.) sed la situacio de Esperanto en tiu regiono restas tre malforta laŭ la nombro de la parolantoj.

Ni volas daŭrigi nian retan anoncadon en tiu regiono kaj ni volas venigi junajn homojn el tiu regiono al internaciaj Esperanto-aranĝoj.

UEA starigis la Fondaĵon MONA kaj nun ni bezonas helpon de unuopaj esperantistoj, kiuj pensas, ke ni semu kaj semu konstante. Sendu vian esencan eĉ se malgrandan kontribuon al la konto “arabio” ĉe UEA. Pagmanieroj en <http://www.uea.org/alighoj/pagmanieroj>. Indiku “por arabio”.

Dankon!

*Renato Corsetti*



**Eŭropa Festivalo  
de Esperantaj Kantoj**  
Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej

## Jam la sesan fojon en Vroclavo oni kantis en Esperanto

La 19-an kaj 20-an de majo 2018 en Vroclavo, en *Zespół Szkół* n-ro 14, okazis la 6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, sub la patroneco de EUROKKA, *Juna Amiko* kaj s-ino Mila van der Horst-Kolińska.

Ĉi-jare la festivalon memstare organizis la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, ricevante partan monsubtenon de la urbo Vroclavo (*www.wroclaw.pl*).

En la festivalo partoprenis infanoj, junuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj en du kategorioj: solisto kaj koruso aŭ ensemblo. Ĉiu partoprenanto kantis du kantojn: unu en Esperanto, la alian en sia gepatra aŭ fremda lingvo. Pritaksataj estis nur la Esperantaj kantoj.

Sabate, la 19-an de majo, okazis konkursa provaŭdo de la partoprenantoj, kiun lerte gvidis **Halina Kuropatnicka-Salamon**. La ĵurio, kiu konsistis el esperantistoj (**Małgosia Komarnicka** el Pollando kaj **Jean-Marc Leclercq** el Francio) kaj muzikistoj (**Wojciech Lawnikowicz** kaj **Marek Szpigelman** el Pollando) – prijuĝis la prezentiĝojn de la partoprenantoj. En la pritakso estis konsiderataj: lingva korekteco, originaleco, inventemo kaj estetikaj valoroj.

Dimanĉe, la 20-an de majo, okazis Koncerto de la Premiitoj, kiun gvidis **Małgosia Komarnicka**, la iniciatinto de la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kaj **JoMo**, E-kantisto kaj posedanto de *Guinness*-rekordo. Post mallonga prezento de la festivala regularo la publiko kun plezuro aŭskultis la premiitajn kantojn, kaj fine de la koncerto de la premiitoj JoMo kante amuzis la publikon, kiu dancis sur la scenejo kaj apud ĝi.

La premiitoj ricevis diplomojn, pokalojn, belegajn albumojn, memoraĵojn, florojn kaj poeziajn volumetojn donacintajn de **Halina Kuropatnicka-Sa-**



La koruso **O'kropy**, laŭreato de la Publik-premio (supre).  
Gvidantoj de la programo (malsupre maldekstre)  
kaj Elonara Maras kantanta (dekstre).



**lamon**, kaj de **Stefan MacGill** ili ricevis Esperanto-lernolibrojn kaj ekzemplerojn de la revuo *Juna Amiko*. Ĉiuj partoprenintoj ricevis diplomon.

La ĵurio jam tradicie aljuĝis ankaŭ premiojn pro akompanado. Krome estis aljuĝitaj du novaj premioj: *Grand Prix* kaj Publik-premio. La premion *Grand*



*Prix* ricevis **Ewa Domańska** el Vroclavo, kaj la Publik-premion ricevis la konata koruso **O'kropy** el Góra. La organizantoj aprezis ankaŭ la penan laboron de la tradukistoj kaj de la ĵurio.

Ni jam nun invitas vin al Vroclavo por ĉeesti en la sekva, 7-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kiu okazos en majo 2019.

*Małgosia Komarnicka*

### La Festivalo vidita deflanke

Dimanĉe, la 20-an de majo, mi hazarde fariĝis parto de la publiko dum la Koncerto de la Premiitoj de la 6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Mi veturigis al ĝi miajn konatojn per mia aŭto, kaj mi intencis reveni hejmen. Tamen mi ne faris tion, sed pasigis esceptajn momentojn kun kantoj en la belega lingvo Esperanto. Ne konante tiun lingvon, mi tamen rekonis kelkajn vortojn ...

Jam dum la koncerto mi faris al mi la demandon, al kiu mi ne scipovas respondi: kial la belega kaj facila lingvo Esperanto ankoraŭ ne fariĝis vere internacia lingvo?

*Henryk Stepień*



## Interlingvistiko kaj Esperanto en la Filozofia fakultato de la Zagreba Universitato dum la akademia jaro 2017/18

Dum la vintra semestro de la akademia jaro 2017/18 kiel parto de instruoferto de la elekteblaj kursoj en la Germana fako de la Filozofia fakultato de la Zagreba Universitato estis instruataj du studobjektoj: *Planlingvoj* kaj *Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto*. La studobjekto *Planlingvoj* estis instruata en la germana lingvo al 35 bakalaŭraj studentoj de la germana lingvo kaj literaturo. La kroatlingvan studobjekton *Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto* partoprenis 4 magistras studentoj de la Filozofia fakultato, kiuj studas aliajn fakojn kaj ne germanan lingvon kaj literaturon.

Ambaŭ kursoj estis simile strukturitaj – en la enkonduka parto estis prezentitaj unuflake la fenomeno de lingvoinventado el la historia, sociolingvistika kaj lingvistika vidpunktoj kaj, aliflanke, interlingvistiko kaj esperantologio kiel sciencaj subfakoj de lingvistiko, sociolingvistiko kaj aplikita lingvistiko. La dua parto de la kurso estis dediĉita al lernado de Esperanto laŭ la Zagreba metodo. Estis uzataj la respektivaj germankaj kroatlingva Esperanto-lernolibroj.

La ekzameno konstistis el du partoj: skriba kaj buŝa. En la skriba parto la studentoj devis montri iliajn bazajn konojn de elementoj de la Esperanta gramatiko kaj leksiko, dum por la buŝa parto de la ekzameno ĉiu studento devis prepari kritikan interpretaĵon de iu altnivela scienca interlingvistika artikolo, studo aŭ eĉ libro.

Oni eble menciu ĉi tie la fakton, ke la studobjekto *Planlingvoj* estis la unuan fojon instruata en la akademia jaro 2007/2008 kaj *Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto* en 2008/2009 kadre de tiutempe enkondukitaj novaj studprogramoj kreitaj laŭ la principoj de la tielnomata bolonja reformo. Post la dekjara sperto montriĝis, ke la studentoj ĝenerale scivolemas pri la fenomeno de lingvoinventado kaj interesiĝas pri lernado de Esperanto. Kelkfoje okazis, ke ne ĉiuj interesiĝintoj povis esti akceptitaj en la kurso *Planlingvoj* pro – laŭ la instrupedagogiaj kriterioj – limigita nombro de partoprenantoj.



**Velimir Piškorec**

Dum la unuaj jaroj de la instruado de tiuj du studobjektoj oni pli multe okupiĝis pri la teoriaj kaj historiaj aspektoj de planlingvoj kaj interlingvistiko, kio rezultis je manko de instruunuoj por lernado de Esperanto. Pro tiu fakto, dum la lastaj jaroj de la instruado oni pli koncize traktis la teoriajn aspektojn por ke pli da instrutempo restu por okupiĝi pri Esperanto. Pro la specifa strukturo de la studentoj, kiuj kvazaŭ senescepte studas iun filologian fakon kaj havas plurlingvajn kompetencojn, la instruado de Esperanto portis kun si samtempe fruktoplajn lingvokomparajn diskutojn kaj envidojn.

Por la akademia jaro 2018/19 estas antaŭvidate, ke en la vintra kaj en la somera semestroj estu ofertata la studobjekto *Planlingvoj*, dum *Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto* en tiu akademia jaro ne estos instruata. Nome, tiu studobjekto estas instruata nur dum akademias jaroj en kiuj la instruisto havas malpli da instrutaskoj en la Germana fako.

*Velimir Piškorec*



## Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo okazos la 22-an kaj 23-an de septembro 2018

Apenaŭ pasis la 20-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco, okazinta en Bjelovar, kaj bjelovaraj esperantistoj jam anoncas novan aranĝon: la 6-an renkontiĝon *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo*, kiu okazos la 22-an kaj 23-an de septembro 2018. Ĉiuj ĝisnunaj aranĝoj havis interesajn programojn, sed jen venis la momento por iom pli serioza temo: **Kontribuo de esperantistoj al la kultura progreso de Bjelovar tra la historio**. Bjelovarnoj elektis tiun temon kiel enkondukon en la festadon de la 110-a datreveno de ilia societo, kiu devus okazi en 2019. Okaze de tiu jubileo ili planas eldoni monografion pri Esperanto en Bjelovar, kaj do jam nun indas rememori pri meritaj lokaj kaj regionaj samideanoj, kiuj estis ne nur esperantistoj, sed ankaŭ gravaj kulturaj agantoj. Kaj tiaj ne mankis en Bjelovar! Eble pli multe ol ie ajn alie en Kroatio, tio tre klare sentebblas kaj

rimarkeblas. Tiaj homoj helpis por Esperanto akiri la pozitivan socian statuson en Bjelovar. Ekadre de la septembra aranĝo okazos ronda tablo aŭ simpozieto pri tiu temo, por kiu ni serĉas prelegantojn, sed invitas ankaŭ aŭskultantojn.

La septembra aranĝo prezentos al ni denove deklamantojn de nia poezio en la 6-a Deklamkonkurson, kiu tradicie okazas en Bjelovar. Ni invitas vin jam nun aliĝi kaj partopreni tiun malgrandan, sed simpatian konkurseton, kiu akiras internacian karakteron.

Aparta interesajo estas, ke septembre aperos la Esperanta traduko de la verko *Fruaj tagoj* de Goran Tribuson, la bjelovara verkisto (kaj mallonge ankaŭ lernanto de Esperanto).

Samkiel dum la pasintaj jaroj, ankaŭ ĉi-jare la aranĝon finance subtenis Urbo Bjelovar kaj la urbestro Dario Hrebak. La respektiva kontrakto pri la financoj estis subskribita la 12-an de aprilo.

Kompreneble ke krom tiuj ĉi programoj en Bjelovar atendas vin ankorau kelkaj surprizoj. Unu el tiaj estas ekspozicio de insignoj el la granda kaj valora kolekto de nia forpasinta membro **Nikola Golić** (vidu la nekrologon en la numero 6 de nia gazeto!). Pri tiu kolekto neniu el ni sciis ion ajn, sed montrigis, ke Nikola dum jaroj estis pasia kolektanto de sportaj insignoj, speciale pri la temoj de someraj kaj vintraj Olimpikoj. Nun temas pri vere granda kaj valora kolekto, kiun la vidvino Monika volus vendi al serioza kolektanto ie ajn en Kroatio aŭ en la mondo. Ĉu vi konas tian homon? Antaŭ ol la kolekto estos vendita, ni volus ĝin publike prezenti kaj omaĝi al nia membro.

Bjelovarnoj do invitas vin, ke jam nun en viaj kalendaroj vi rezervu la 22-an kaj 23-an de septembro por partopreni la anoncitan aranĝon. Bonvenon!

Zdenka Polašek

## Kelkaj vizitindaj aranĝoj en julio

*7-a – 14-a de julio:* La **84-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE)** okazos en la hotelo *Tomislavov dom* sur la monto Medvednica apud Zagrebo. Kongresa temo: *Kion, kiel kaj kiom ni legas?* Organizanto: Antun Kovač, [antun2805@gmail.com](mailto:antun2805@gmail.com), tel: +385 98 9935712, kaj Dragan Štoković, [stokovic@globalnet.hr](mailto:stokovic@globalnet.hr)

*13-a – 16-a de julio:* **Usona-Kanada Landa Kongreso** en Seattle (Usono). Programeroj kaj prelegoj por esperantistoj de ĉiuj niveloj. Ĉefprelegos Chuck Smith pri la temo *Konstruado kaj ĝuado de Esperanta komunumo*. Organizanto: Esperanto-USA, 1500 Park Ave Ste 134, Emeryville CA 94608, Usono; [seatlo2018@esperanto-usa.org](mailto:seatlo2018@esperanto-usa.org)

*13-a – 19-a de julio:* La **10-a Kultura Esperanto-Festivalo (KEF)** en Lesjöfors (Svedio). Festivalo de originala Esperanto-kulturo. Organizanto: Esperanto-Gastigejo, Esperanto-Gården, Stiftelsevägen 1, SE-680 96 Lesjöfors, Svedio; [info@esperantogarden.se](mailto:info@esperantogarden.se)

*20-a – 22-a de julio:* La **77-a Hispana Kongreso de Esperanto** en Madrido (Hispanio). Ĝi okazos samtempe kaj samloke kun la 51-a kongreso de ILEI. Organizantoj: Madrida Esperanto-Liceo kaj Hispana Esperanto-Federacio, Rodríguez San Pedro 13-3-7, ES-28015 Madrid, Hispanio; [kongreso2018@esperanto.es](mailto:kongreso2018@esperanto.es)

*21-a – 27-a de julio:* La **30-a Internacia Esperanto-Konferenco (IEK)** en Kastelo Greziljono (Francio). Ĉeftemo: *Esperanto en artoj*. Prelegoj, ekskursoj kaj atribuo de OSIEK-premio. Informoj kaj aliĝo: Kastelo Greziljono, St. Martin d'Arcé, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio; [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

*21-a – 28-a de julio:* La **39-a Renkontiĝo de Esperanto-Familioj (REF)** en Mühlhausen (Germanio). Komuna restado de familioj kiuj uzas Esperanton kiel unu el siaj hejmaj aŭ familiaj lingvoj. Varia programo, kiun aranĝas kaj plenumas la partoprenantoj mem: komuna kantado, skeĉoj, filmvesperoj, rakont-vesperoj, koncertoj, plurtaga serĉado de fantomo, promenoj, ekskursoj, gepatraj interkonsiliĝoj, lokaj popoldancoj, sportoj teamaj kaj tandemaj, lingvaj kaj E-kulturaj atelieroj por infanoj kaj plenkreskuloj. Organizanto: Carolin kaj Robert Weemeyer; [robert.weemeyer@esperanto.de](mailto:robert.weemeyer@esperanto.de)



## Mallongaj informoj

### Publike pri Esperanto

**Podravski list** (Koprivnica) de la 14-a de majo 2018 sur la paĝo 24 publikigis la artikolon *Cijeli ih je svijet znao po esperantu* (La tuta mondo konis ĝin pro Esperanto), pri la fenomeno de Esperanto en la vilaĝo Koprivnički Bregi.

**Bjelovarac** (Bjelovar) de la 14-a de junio 2018 (n-ro 3522) sur la paĝo 31 publikigis la artikolon *Župan Bajs nas podržava još otkako je bio minsitar!* (La departementestro Bajs subtenas nin ankoraŭ ekde kiam li estis ministro!) pri la 20-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco.

### Forgesitaj samideanoj

La lasta el la ses prelegoj en la serio *Forgesitaj samideanoj*, kiu devis okazi la 30-an de junio en la sidejo de UZE en Zagrebo, estas nuligita. Ĝi okazos en septembro ĉi-jare.

### Movada foiro en Lisbono

Ni informas niĝn legantojn, ke la komuna agad-platforno KRESKO de kroataj esperantistoj havis sian standon dum la Movad foiro en la UK en Lisbono, al kiu alighis 109 asocioj! Bonvolu viziti ĝin la 28-an de julio je la 19h00 kaj informighi pri nia agado.

### Fraŝkoj de Handzlik en la rusa

En oktobro 2017 Mikaelo Bronŝtejn partoprenis la 5-an festivalon de slava poezio en Bielsko-Biala (Pollando). Tie li la unuan fojon aŭdis pollingvajn fraŝkojn de nia konata artisto Georgo Handzlik. Fraŝko estas mallonga versaĵo kun satira enhavo, simila al epigramo.

Bronŝtejn proponis al la aŭtoro, ke la plej bonaj el pli ol 2000 liaj fraŝkoj estu tradukitaj en la rusan kaj aperu publike, ĉar la rusoj ege ŝatas polan humuron.




Rezulte de tio, antaŭ nelonge en Moskvo aperis impona ruslingva libreto *Польские фрашки от Георга Хандзлика* (Polaj fraŝkoj de Georgo Handzlik). Ĝin konsistigas pli ol 200 fraŝkoj rusigitaj de Mikaelo Bronŝtejn. La unua prezentado de la libro okazis komence de junio en Moskvo, dum la renkontiĝo de moskvaj esperantistoj. La libro estis akceptita ride kaj aplaŭde.

## Laste aperis



18,00 eŭroj



15,00 eŭroj



30,00 eŭroj

+ 15% sendokostoj

# Ni estu solidaraj!

**Ni helpu al la familio de DAVOR GRGAT  
solvi la minacantan danĝeron!**

Ĉu vi, karaj legantoj, povas imagi la situacion, kiu minacas vian familion, kaj okazas ne pro via kulpo, sed pro hazardaj eventoj, kiujn vi ne povis influu? La vivo alportas al ni diversajn dramojn! Pri simila dramo nian redakcion informis s-ino **Maja Mataga**, filino de la forpasinta multjara Esperanto-aktivulo **Davor Grgat** (vidu la nekrologon en *Kresko* n-ro 2, paĝo 18). Ankoraŭ en aprilo Maja Mataga telefonis al la redaktoro de *Kresko*, petante helpon de la esperantistaro.

Sia patro Davor uzis du bankajn kreditojn, kiujn li regule repagadis, sed pri kiuj la situacio post lia morto tre komplikiĝis. Por repagi ambaŭ kreditojn la familio devus havi ĉirkaŭ 40.000 kunaĵojn, (proksimume 5.300 eŭrojn), sed ĝi ne havas tiun monon. La sumo mem ne estas enorme granda kaj nerepagebla, sed la tuta familio suferas grandegajn financajn kaj sanproblemojn. La familianoj praktike ne laboras kaj ne ricevas salajrojn. Eĉ Maja Mataga, kiu estas la sola el la familianoj kiu baldaŭ ricevos sian salajron, antaŭ duonjaro estis operaciita je cerba tumor, kaj apenaŭ antaŭ kelkaj semjnoj revenis al sia laborejo. La bankoj intertempe ne toleras la ŝuldojn! Jam pli ol duono de la menciitaj kreditoj devis esti

repagita, sed la abrupta morto de Davor kaŭzis ĉeson de monalfluo en lian konton.

Pro tiu absurda situacio, la familio de Maja Mataga jam kelkfoje estis invitita de la bankoj, ke ili tuj repagu siajn ŝuldojn. Se tio ne okazos, la bankoj baldaŭ postulos pagon per konfisko de ilia posedaĵo, respektive de la domo en kiu ili loĝas.

Pri tiu problemo diskutis kelkaj kroataj esperantistoj, sed poste nenio okazis. La 25-an de majo Maja Mataga sendis al la redaktoro de *Kresko* personan rajtigilon, subskribitan ĉe la notario, per kiu ŝi rajtigas lin ekkolekti monon por repagi la ŝuldojn al la banko. Ni kredas je solidareco de niaj samideanoj, kaj klopodos helpi al la familio de Davor Grgat. La sukcesoj de tiu kampanjo tamen ne dependas de la redaktoro, sed de ni ĉiuj.

Ni afable invitas vin pripensi la malagrablan situacion de la familio de Davor Grgat, kaj petas vian urĝan helpon. Nun plej urĝe ni devus kolekti ĉirkaŭ 3.000 eŭrojn, por eviti la danĝeron de la konfisko. Aparte ni invitas tiujn esperantistojn, kiuj pretus ĉiumonate pagadi certan sumon, por ke ni povu repagi regulajn partopagojn dum la sekvontaj monatoj.

Pli detalajn informojn vi povas peti individue ĉe: **josip.pleadin@gmail.com**

En *Kresko* ni publikigos la rezultojn de nia kampanjo, sen detaloj pri nomoj de la donacintoj kaj bankoj. Tiajn informojn kaj la kopion de la rajtigilo de Maja Mataga ĉiu ricevos individue.

Davor Grgat dum la tuta vivo enorme kontribuis al Esperanto. Nun venis la tempo, ke esperantistoj helpu al lia familio, kiu sen propra kulpo trovis sin en malagrabla situacio, kun anonco de katastrofaj konsekvencoj. Ĉu ni rigardos ilian malfeliĉon kvazaŭ ĝi ne koncernus nin, aŭ ni montros nian solidarecon al ili? Se diri sincere, al Davor Grgat nia movado certe ŝuldas multe pli ol estas la menciita sumo!



Ĉi foje ni decidis nian **ROZON** atribui al **Boris Kolker** el Usono. Pluraj esperantistoj el kelkaj landoj skribis al nia redakcio, ke nian gazeton ili ricevis aŭ regule ricevadas ĝuste de Boris Kolker, kiu la volontulan taskon de nia distribuanto transprenis kaj plenumis sen nia scio kaj sen publika fanfaronado. Sur tiaj principoj staras la agad-platformo KRESKO. Oni ne atendu „ordonon” aŭ „peton”, sed mem agu por komunaj celoj enkadre de siaj kapabloj kaj povoj, ne atendante personan gajnon aŭ publikan famon!

## KRESKO monata informilo

### Eldonas:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE),  
Jarunska 6, 10000 Zagreb

**Retadreso de la redakcio:**  
[zagreba.esperantisto@gmail.com](mailto:zagreba.esperantisto@gmail.com)

**Redaktas:** Josip Pleadin

*Kresko* aperas en la lasta tagdeko de ĉiu monato.

***Kresko* estas libere distribuebla,  
kopiesbla kaj citebla.**